


majo 1971

64-a jaro

n-ro 786 (5)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



JUNECO

Vi trovos

junulecan aspekton de la kovrilpaĝo pro la ĉefartikolo de d-ro Tonkin.

Sur la paĝoj 84-86 troviĝas artikolo de prof. G. Waringhien, la prezidanto de la Akademio de Esperanto, en kiu li resume sed samtempe profunde prezentas kelkajn historiajn eventojn, kiuj donas klaran bildon pri la pozicio de la nuna Esperanto-movado en la perspektivo de pluraj jarcentoj. La emo de la homoj pesi aferojn per la mezurilo de la propra vivolongo ofte influas forte ilian antaŭvidon pri la evoluo estonteca.

Tion ilustras ankaŭ la reagoj al la artikolo de Baldur Ragnarsson, aperinta en la februara numero, el kiuj ni ĉerpis la opiniojn pri la perspektivoj de Esperanto prezentitajn sur la paĝo 92.

Tiel la artikolon de s-ro R.T. Sandberg pri la vidpunktoj de redaktoro (p. 90-91), kiel ankaŭ la raporton pri la ĉi-jara Semajno de Internacia Amikeco, verkita de ĝia iniciatinto s-ro Erik Carlén (p. 82), povas profiti la aktivuloj en informado pri Esperanto — kiuj cetere ne preterlasos ankaŭ la artikolon en la serio pri la Principaro de Frostavallen (p. 91).

Enhavo

- 81 Juneco (Tonkin)
- 81 Deklaro
- 82 Enkonduko de Esperanto ankaŭ en Latva SSR
- 82 Ĉu jam tradicia la Semajno de Internacia Amikeco? (Carlén)
- 83 Du pliaj lingvoj — en Eŭropa Konsilantaro
- 84 Esperanto en la evoluo de moderna penso (Waringhien)
- 87 Literuma alfabeto por radioamatoroj (Chambers)
- 88 Recenzoj
- 89 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj)
- 90 Redakta arto gravas en informado (Sandberg)
- 91 Por pli efika informado (5): Pri kio informadi? (Lapenna)
- 92 Perspektivoj de Esperanto — surbaze de diversaj tempaj premisoj
- 93 Loke — Fake — Persone
- 94 Per TEJO al labortendaroj (TEJO-paĝo)
- 95 Kalendaro
- 95 Citaĵoj
- 95 Nekrologoj: Asqueri, Bokarev, Lewin, Yelland
- 96 57-a Universala Kongreso: Unua komuniko pri Portland
- 97 56-a Universala Kongreso, Londono, aŭgusto 1971
- 98 Ĉu vi timas aŭskulti Esperanton? (radio)
- 99 Oficiala informilo n-ro 445
- 99 Anoncetoj

La kovrilo

Juneco: ĉiuj homoj, ĉiuj estaĵoj spertas junecon dum sia vivo. Ofte junuloj forgesas, ke ili iam eksjuniĝos, kaj eksjunuloj forgesas, kion ili mem pensis kaj kiel ili agis en sia junaĝo. Onidire, la plejparto de gravaj inventoj, eltrovoj, reformoj k.s. estas farita kaj farata de relative junaj personoj. Tiurilate Zamenhof kaj Esperanto ne estis escepto, kion akcentas en la apuda paĝo la prezidanto de TEJO, junulara sekcio de UEA. Sendube la Esperanto-movado atendas de la juna generacio kreivecon ĉiuf flankan. (Fotis: s-ro Van Hauwaert Karel, Belgujo.)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Redaktoro: f-ino A. Nagata.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Aŭstralio, Nov-Zel-do 13,75; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Usono, Meks. 5,50; Isr. 2,75 gld.

Anonc-tarifo: 1 p. 285 gld., 1/2 p. 150 gld., 1/4 p. 85 gld., 1/8 p. 50 gld. 1/16 p. 35 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefona: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.

Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 89 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.G.

Estrarano pri TEJO kaj junularaj aferoj: U.J. Moritz, D-511 Alsdorf, Blumenstr. 7, F.R. Germanujo.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: J. Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75-Paris 17^e, Francujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj kaj eldonaĵoj: J. Uśpieński, Poŝtkesto 100, Warszawa-12, Polujo.

Estrarano pri financoj kaj administrado: E.J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

JUNECO

Antaŭ pluraj jaroj d-ro Lapenna, en publika parolado, redifinis la rolon de la junularo en la kadro de UEA. Li atentigis, ke la junularo ne estas fako, sed stato: ni ĉiuj estas junaj en iu stadio en la vivo. Tiu diferencigo inter la junularo kaj, ni diru, la instruistoj aŭ la fervojistoj, estas tre grava, ĉar ĝi indikas, ke la junularo ne estas ia flanko aŭ speciala interesogrupo, sed integra kaj esenca parto de la ĝenerala movado.

Kun tiu integreco kompreneble kuniras respondecoj. Se la instruistoj malbone laboras, Esperanto en la lernejoj suferas; se la fervojistoj neglektas siajn taskojn, Esperanto ne enpenetras la fervojan medion. Sed se la junularo ne kontribuas sian energion al la disvastigo de Esperanto, ni perdas unu tutan generacion: la kontinueco de la strebado estas serioze interrompita, kaj la tuta estonteco de la movado (ne nur de *parto* de la movado, sed la *tuto*) estas endanĝerigata.

En la nuna tempo ne ekzistas dubo pri la entuziasmo de niaj junaj homoj kaj ilia deziro kontribui al la agado por Esperanto. Neniu leganto de la revuo de TEJO, *Kontakto*, povas dubi pri la eksterordinare vasta spektro de intereso kaj talentoj, kiuj troviĝas inter la junularo. En Japanujo, regulaj instruaj renkontiĝoj dum semajnfinoj fariĝis normala elemento en la junulara Esperanto-movado; en Italujo, la gejunuloj entuziasme alportis la Esperantan idealon en la propran socian agadon; en multaj aliaj landoj laŭ plej diversaj manieroj la junularo ludas sian rolon.

Generaciaj konfliktetoj — tamen sanaj

La gazetaro kaj la specialistoj ofte nin informas, ke la nova generacio ricevas la plej intensan edukon kaj estas plej akute konscia pri sociaj problemoj, el ĉiuj modernaj generacioj. Estas do ne surprize, ke la esperantista junularo alproprigis al si ĝuste interesiĝon pri la problemoj de la lingva diskriminacio kaj kultura imperiismo. Se lingvo estas ankaŭ ekonomia armilo — argumentas la junaj esperantistoj —, oni ne povas progresigi Esperanton sen informiĝi pri ekono-

Humphrey Tonkin:
"Ne ekzistas dubo
pri la entuziasmo
de niaj junaj homoj."



miaj realaĵoj malantaŭ la lingva demando. Lingvo — ili sugestas — estas ne nur socia fenomeno, sed ankaŭ politika kaj ekonomia fenomeno.

De tempo al tempo tiu firma, eĉ pasia, kredo tute nature kaŭzas kunpuŝiĝojn kun pli aĝaj esperantistoj, kies metodoj de agado estas pli tradiciaj. Tiaj konfliktetoj estas atendeblaj kaj sanaj. Tiamaniere la Esperanto-movado pliakrigas siajn idealojn kaj pli klare difinas siajn celojn. Efektive malfermiteco al novaj konceptoj estas esenca elemento en la prospero de ĉia movado, inkluzive la nian.

Junularo konsistigas investon en la estonteco

Estus naive supozi, ke la junaj esperantistoj ne konscias pri la propra valoro. Ĝuste el la konstato, ke la junularo konsistigas investon en la estonteco de Esperanto, fontas la kuraĝo de la junaj homoj firme kaj fiere prezenti kaj advokati siajn ideojn. Ili *estu* fieraj kaj ili ja insistu pri la propra valoro — sed ili samtempe pruvu ĝin per sindediĉo al la laboro por la Internacia Lingvo. Ĉar finfine la lojaleco de konscia esperantisto devus direktiĝi ne al la propra prospero, nek al la prospero de difinita grupo aŭ asocio aŭ fako, sed al la prospero de la lingvo mem kaj de ĝia movado. Al tiu prosperigo ni ĉiuj alportas niajn specialajn talentojn kaj temperamentojn. Ĉefa ingredienco en ĉiu kunmikso de talentoj en floranta organizaĵo estas la junecaj vervo, entuziasmo kaj novigemo. Prof. Lapenna estus povinta aldoni, ke el tiu "integra parto" de la movado, kiu estas la junularo, venis UEA, organizita de la juna Hodler, venis la tuta ideo pri la publika bildo de Esperanto, elpensado de la juna Privat, kaj venis eĉ la lingvo mem, kreaĵo de juna, nekonata okulisto en rusa Pollando.

Humphrey Tonkin, prezidanto de TEJO

DEKLARO

La subskribintaj reprezentantoj de la Estraro de UEA, unuflanke, kaj de Internacia Esperanto-Instituto kaj Universala Ligo, aliflanke, informas, ke hodiaŭ ili atingis ekster-tribunalan kompromisan interkonsenton metantan finan punkton al la konflikto, kiu estiĝis inter la partioj en ligo kun la siatempa transdono de "La Praktiko" al UEA.

Hago, la 7-an de marto 1971

Por UEA

E.L.M. Wensing

Por Internacia Esperanto-Instituto

A. Cseh

Por Universala Ligo

H.J. Hendriksen

ENKONDUKO DE ESPERANTO ANKAŬ EN LA LATVA S.S.R.

Post la viglaj novaĵoj el la du respublikoj Estonujo kaj Litovujo en Sovetunio (vidu: *Esperanto*, n-ro 760, p. 42; n-ro 767, p. 164; n-ro 769, p. 182; n-ro 776-7, p. 107; n-ro 781, p. 182), el la najbara respubliko Latvujo venis simila sciigo.

Lastatempe la Eduka Ministerio de Latva S.S.R. eldonis instruprogramon de Esperanto, kiu estas deviga por ĉiuj lernejoj, kie troviĝas instrukapablaj esperantistoj kaj interesiĝantoj por lernado. Reage al tiu instruprogramo, la Domo de Instruistoj, t.e. unuiĝo de ĉiuj instruistoj en Latvujo, organizis unuajn oficialajn Esperanto-kursojn, ne nur por instruistoj, sed

ankaŭ por aliaj, kiuj havas intereson pri la Internacia Lingvo. La kursoj estas senpagaj. Al la instruistoj de Esperanto salajron pagas la respubliko.

En la nun komenca stadio, malgraŭ la preskaŭ deviga instruprogramo, oni instruas la Internacian Lingvon nur al libervoluloj, ne por ĉiuj gelernantoj (supozeble pro nesufiĉa nombro de kapablaj instruistoj).

En Latvujo, havanta proksimume 2 300 000 da loĝantoj, el kiuj 62 procentoj estas latvoj kaj la ceteraj estas rusoj, belorusoj kaj poloj, la lingvoj uzataj estas la latva kaj la rusa.

Ĉu jam tradicia la Semajno de Internacia Amikeco

La Semajno de Internacia Amikeco, lanĉita de UEA laŭ iniciato de Erik Carlén, ne plu estas tute nova. Sed ĉu ĝi fariĝos malnova? Ĉu ĝi iam estos tia universala festo en la Esperanto-movado, kia estas la Zamenhof-Tago? Kiel montras la raporto de s-ro Carlén, la sukcesoj ĝis nun estis grandaj en kelkaj landoj kaj kelkaj medioj, dum sur aliaj teritorioj la eĥo estis ŝajne minimuma. Eble tiuj lastaj povus ĉerpi inspiron el la pozitivaj rezultoj de la unuaj.

Kiel iniciatinto de SIA mi ricevis salutojn dum la Semajno el multaj landoj. Mi kore dankas kaj bedaŭras, ke mi ne povas reciproki al ĉiu per karto. Bedaŭrinde estas neeble skribi kompletan raporton pri la festado de la Semajno en la tuta mondo, ĉar la informoj, kiujn mi ĝis nun ricevis, estas tro sporadaj. Sed tiom mi jam vidis, ke mi konvinkiĝis, ke Semajno de Internacia Amikeco venis por resti en la movado.

Nederlando — Bonegan ideon lanĉis Frisa Esperantista Rondo en Leeuwarden, Nederlando. Oni kombinis dum la Semajno Esperanton kun alia internacia afero, la arto. Oni invitis konatan teksistinon kaj pentristinon, Anne Porte. Ŝi faris ekspozicion de siaj murtapiŝoj kaj pentraĵoj. Unue oni kantis esperantlingve "Donu al mi vian manon, amiko" (= la konata kanto de Ramona van Dasem). Jam antaŭe oni atentigis pri la Semajno per afiŝoj. Preskaŭ samtempe kun SIA estis bulbflora ekspozicio. Ankaŭ tie oni aperigis afiŝojn pri SIA, kaj en la landoj, kie oni vendis artobjektojn, oni havis afiŝojn kun la teksto en nederlanda lingvo: "Semajno de Internacia Amikeco 21-27 febr. (La emblemo) Sendu al viaj eksterlandaj gekonatoj saluton kaj iun frisan artobjekton." Pri la interrilato de la Semajno kun Esperanto kaj pri la avantaĝoj de nia lingvo informis disdonitaj folietoj.

Mi menciis Nederlandon unue, ĉar bonegan raporton la frisaj geamikoj donis pri vere bonega aranĝo.

Belgujo — La ministro pri Edukado kaj Nederlandlingva Kulturo post propono de d-ro W. de Smet decidis sendigi cirkuleron al lernejoj. En tiu cirkulero la ministro invitis instruistojn pri moralo kaj religio pritrakti la temon de Semajno de Internacia Amikeco dum iu leciono. Teksto estis aldonita, kiu povis servi kiel modelo, kaj en ĝi plurloke Esperanto estis menciita. En la romkatolikaj mesoj en Kalmthout la pastro menciis Semajnon de Internacia Amikeco la 20-an kaj 21-an de februaro kaj ankaŭ parolis pri ĝi en sia prediko. En la diservo dum la sabato junulara kanto kantis ankaŭ kelkajn kantojn en Esperanto. En la menciita vilaĝo okazis ankaŭ prelego de d-ro Wouters pri la temo: "La homo kiel kulturkreanta estaĵo". En la enkonduko s-ro A. Overlaet atentigis pri mondkulturo, pri internacia amikeco, pri SIA kaj pri Esperanto. En Antwerpen okazis speciala SIA-vespero, organizita de la Esperanta grupo. Oni esperas venontjare agi pli vaste.

Pollando — Antaŭ mi estas eltondaĵo el la pola gazeto *Dziennik Bałtycki*. Laŭ traduko, kiun mi ricevis, la artikolo havas la rubrikon "La Semajno de Internacia Amikeco de esperantistoj" kaj rakontas pri diversaj renkontiĝoj en Pollando okaze de la Semajno. Menciinda estas la "Vespero de Amikeco" la 27-an de februaro, organizita kun Asocio de Pol-Soveta Amikeco en Gdańsk. Antaŭ mi sur la tablo kuŝas

ERIK
CARLÉN

DU PLIAJ LINGVOJ

— en Eŭropa Konsilantaro

La tendenco de transiro de dulingvismo al plurlingvismo nun troviĝas ankaŭ interne de Eŭropa Konsilantaro (E.K.).

E.K., fondita en 1949, nuntempe konsistas el 17 landoj ĉefe el la okcidenta Eŭropo, enhavas Ministran Komitaton, Konsultan Asembleon kaj plurajn komisionojn, kaj plene funkcias por la ekonomia kaj socia evoluo inter la ŝtatoj-membroj kiel superŝtata organizaĵo. Inter la ŝtatoj-membroj troviĝas, krom la membroj de Eŭropa Ekonomia Komunumo, Aŭstrujo, Britujo, Danlando, Irlando, Islando, Kipro, Malto, Norvegujo, Svedujo kaj Turkujo. La oficialaj lingvoj de E.K. laŭ la statuto estas nur du: la angla kaj la franca.

Laŭ peto de F.R. Germanujo kaj Italujo, la eŭropa komisiono de E.K. pasintjare studis la problemon,

kiujn aliajn lingvojn, krom la angla kaj franca, E.K. uzu. Por faciligi la partoprenadon de la germanoj kaj italoj (entute 36 personoj) en la Asembleo, la komisiono aprobis la uzadon de la germana kaj itala lingvoj en E.K. inkluzive de ĝiaj komisionoj. La Asembleo havas proksimume 150 membrojn.

Aliflanke la belga propono egalrajtigi la nederlandan lingvon en E.K. akiris la subtenon de nur Nederlando.

La nombro de la belgaj kaj nederlandaj membroj de la Asembleo kune estas 14. Kompare kun tiu de la germanaj kaj italaj ĝi estas malpli ol duono.

Kie, ju pli da ŝtatoj postulas egalrajton, des pli komplikiga la lingva labirinto, tie ekestas la bezono de la radikala solvo: havi solan Internacian Lingvon.

Amikeco ?



karto okaze de la 3-a Semajno de Internacia Amikeco, sendita de partoprenantoj de la 18-a marborda junularkunveno. La karto estas plena de nomoj. Dankon, polaj geamikoj! Ankaŭ el aliaj partoj de Pollando mi ricevis aŭ vidis amikokartojn.

Svedujo — Oni presigis bonajn afiŝetojn por butikoj ktp. Ili estas uzeblaj de jaro al jaro, ĉar ili indikas, ke la Semajno ĉiam estas festata tra la tuta mondo la lastan plenan semajnon en februaro. La lokaj Esperantaj societoj distribuis la afiŝetojn kaj ankaŭ ordinare havis la tradician amikofeston.

Usono — Esperanto-Societo Walla Walla en ŝtato Washington invitis 9 eksterlandajn studentojn el loka kolegio por festi la Semajnon de Internacia Amikeco per internacia manĝo. Krome la membroj de la Societo sendis amiko-kartojn kaj pendigis diversloke afiŝojn pri internacia amikeco.

◆ ◆ ◆

Salutojn okaze de la Semajno mi ricevis el Bulgarujo, Hungarujo, Italujo, Germanujo. (El Berlino: Festo de internacia amikeco — bonega okazo montri la utilecon de Esperanto.) Kelkaj el tiuj kartoj havas multajn nomojn kaj evidente montras, ke la Semajno jam fariĝis tradicio. Mi ankaŭ scias, ke oni ĉi-jare festis la Semajnon en multaj aliaj landoj, ekz. en Brazilo, Hindujo kaj Hispanujo. Sed, kiel dirite, ofte mankas raportoj.

Entuziasmiga emblemo de SIA

Pri unu afero ni tamen devas denove peti la esperantistojn en diversaj landoj: Respekti la emblemon de la Semajno. Ĝi konsistas el tri partoj: la stelo, la manoj kaj la teksto "Amikeco trans limoj". Ne forigu el ĝi iun ajn parton kaj ne ŝanĝu ĝin. Ĝi ĉiam devas esti ekzakte samforma. Vi povas ricevi de mi bildon, laŭ kiu vi povas fari kliŝojn.

Per la Semajno ni celas tri aferojn en la movado. Unue ni volas krei tradicion kulturan, kiu sente kunigas

la esperantistojn en solidareco. Ankoraŭ la afero estas tro nova por ebligi tion, sed ĝi venas iom post iom. Due ni volas, ke la Semajno donu al ni okazon konatigi niajn aferojn kaj lingvon al la ekstera mondo. Montriĝis, ke la idealo, amikeco trans limoj, plaĉas kaj eĉ entuziasmigas preskaŭ ĉiujn. Oni povas ĝin prezenti al eminentuloj kaj facile varbi ilin al kunlaboro por la ideo — kaj tiel ili ankaŭ nerekte laboras por Esperanto. Trie, sed ne malpli grave: ni volas vivantigi la idealon de amikeco precipe trans la limoj. Mi opinias, ke estas grave, se ni almenaŭ unufoje ĉiujare povas pensigi la homojn pri amikeco kaj afableco. Eble tia pensado pri amikeco kondukas al pli amika konduto. Afableco estas la komenciĝo de amikeco. Amikeco naskas amon kaj pacon.

Al la kritikantoj

Kritike iu demandis: Ĉu Semajno de Internacia Amikeco povas krei amikecon? Mi pensas, ke jes. Ĝi certe ne faros miraklojn, sed ĝi laboras en la amikiga direkto. Kaj imagu: se vi dum iu kongreso konatiĝis al iu, kun kiu vi dum jaroj ne havis kontakton, la Semajno donas al vi okazon sendi karton. Kaj ĝi povas esti la komenciĝo de vera amikeco.

Kompreneble ekzistas ankaŭ kritiko kontraŭ la Semajno. La plej justa kritiko estas, ke la Semajno facile fariĝas ia ludajo en la fermita rondo de la esperantistoj, do preskaŭ ia sekteca afero. Tio estas vera danĝero. Ĉu estontece tiu ĉi kritiko praviĝos, ja tute dependas de la esperantistoj mem. Kiel ni montris, la Semajno fakte donas al ni bonegan okazon agi eksteren ankaŭ inter neesperantistoj. Ankaŭ al ili ni sendu amikokartojn.

Mi renkontis ankaŭ kritikaĉon konsistantan ne el argumentoj sed el kliŝoj kiel "blago", "naivaĵo" ktp. Tia malkonstrua kritikaĉo preskaŭ ĉiam venas de homoj, kiuj mem ne volas labori. "Kritiki estas facile, fari malfacile." Jam nun ni komencu la preparadon por SIA 1972, kaj montriĝos, ke efike disfamiĝos en la mondon: Amikeco trans limoj per Esperanto.



E. Carlén



René
Descartes

Estas konata la akuzo de kelkaj kontraŭuloj de Esperanto, ke la evoluo de la moderna mondo preterpasis kaj malaktualigis la Internacian Lingvon. Ni preferas kredi, ke la mondo ankoraŭ ne sukcesis tiel modernigi, ke ĝi jam akceptus Esperanton. En tiu ĉi kontribuo de la prezidanto de la Akademio de Esperanto, koncizigita teksto de parolado en landa kongreso, prof-o Waringhien ĝuste lokigas la lingvon inter la plej gravaj elementoj en la evoluo de la moderna penso.

Oni jam plurfoje riproĉis al la esperantistoj, ke ili formas kvazaŭ sekton, ke ili ne partoprenas la realan vivon de la nuna mondo, sed, fermante sin en siaj asocioj, kongresoj kaj literaturo, ili restadas aparte de la granda fluo de la moderna penso. Mi volus mal-longe rebati tiun kritikon kaj montri, ke Esperanto, en sia principo kaj en siaj formoj, plej ĝuste adaptiĝas al la ĉefaj tendencoj de tiu moderna penso kaj estas iel unu el ĝiaj plej konsiderindaj historiaj plenumiĝoj.

Antaŭ ĉio estus necese difini tiujn ĉefajn tendencojn, kaj sendube tio povus ekŝajni aŭdaca entrepreno, ki-

**Leibniz: lia
universala lingvo
"servos al la plialtigo
de la prudento".**



am oni konscias, kiom da diversaj, eĉ diverĝaj formoj ĝi alprenis laŭlonge de la kvar lastaj jarcentoj. Tamen mi opinias, ke ni havas kelkan ŝancon distingi el inter ili la plej fundamentajn kaj esencajn, se ni penas reiri en la pasintaĵon kaj provi tie ekkapti ĝian veran fonton. Efektive, pri multaj genioj de la finiĝanta Mezepoko kaj de la Renesanco, oni ofte kaj prave parolas pri la moderneco de ilia pensmaniero; sed preskaŭ ĉiam tiu moderneco ne estas pura, ĝi prezentas sin al ni ankoraŭ tute miksitane kun la restaĵoj de la antikvaj superstiĉoj aŭ skolastikaj rutinoj. Se ni volas ĝuste trafi la originon de nia moderna

ESPERANTO EN LA EVOLUO

penso, ni devos reveturi per la imago ĝis la komenco de la 17-a jarcento, kiam en la malvasta spaco de 13 jaroj, inter 1615 kaj 1628, mirakle malkovriĝis al kelkaj civitanoj de la okcidenta Eŭropo la principoj, kiuj devis certigi al tiu malgranda terparto kaj poste al la tuta mondo la plej grandan ĝis tiam spertitan progreson.

Sendependeco de la scienco

1615: la itala fizikisto Galileo Galilei, en letero al la granda dukino de Toskanujo, asertas la sendependecon de la scienco antaŭ la religiaj dogmoj: "Tial ŝajnas al mi," li skribas, "ke en la diskutado de la problemoj de la fiziko oni devas preni kiel kriterion ne la aŭtoritaton de la sanktaj tekstoj, sed ja la atestojn de la sensoj kaj la evidentecon de la matematikaj demonstroj." Kaj trankvile li konfirmas, li, la unua homo, kiu esploris la ĉielon per unu lorno, ke la tero ne estas la centro de la universo.

1620: la angla kanceliero Francis Bacon publikigas "*Nouum organum scientiarum*" (La nova instrumento de la sciencoj), en kiu li demonstros, kontraŭ ĉiaj argumentoj de aŭtoritateco, la neceson ĉiam iri "*ab experimentis ad axiomata*" (de la eksperimentoj al la aksiomoj).

1625: la nederlanda juristo Hugo de Groot (Grotio), sub sia latina nomo Grotius, aperigas gravan traktaton "*De iure belli ac pacis*" (pri la juro de la milito kaj de la paco), kiu starigas la fundamentojn de la

internacia juro. Tie li, la unua, deklaras, ke sklaveco estas io principe maljusta, kio devas esti aboliciita en prudente regata regno.

1628: la franca eksoficiero René Descartes (Kartezio) fermas sin tutan vintron en modesta sed bone hejtata luĉambro en Amsterdamo kaj tie iniciatas novan manieron filozofiadi kaj redaktas tiujn "*Regulæ ad directionem ingenii*" (Reguloj por la gvidado de la spirito); lia unua rezolucio en tia esplorado estas absolute purigi la tabulon de sia memoro je ĉio, kio ĝin okupas, rekomenci la agon de la pensado ekde la nulo, kaj elekti sin mem kiel solan juĝanton de ĉiuj valoroj en la regno de la sciado; aŭdaca gesto, kiu definitive liberigis la filozofion je la jugo de la tradicio.

Kvar genioj

Tiuj kvar genioj, kiuj fondis preskaŭ samtempe la astronomion, la sciencan metodon, la internacian juron kaj la modernan filozofion, kaj per kies proklamoj vere komenciĝis nova erao en la historio de la civilizo, renkontis tuj fortan opozicion: la kondamnon de Galileo, la persekutadon kaj la eksterlandan fuĝadon de Grotio, la retiriĝeman vivon de Kartezio for de sia patrujo. Nur iom post iom kaj malrapide tiuj revoluciaj ideoj akiris la apogon de la plej grandaj kleruloj, nur malrapide oni antaŭvidis ilian interligitecon. La ĉefaj sekvoj, kiuj evidentiĝis el tiu principa formeto de la tradicio kaj el tiu agnosko de la suvereneco de la racio, estis unue la rajto por ĉiu ho-

mo libere uzi sian prudenton, due la devo de ĉiu homo respekti en la aliaj tiun saman rajton, trie la neceso serĉadi tian novan formon de socio, kiu ebligus, starigus kaj protektus la liberecon de la penso, la toleremon inter la individuoj kaj la pacon inter la regionoj. Jen, kun la ĉion interliganta kredo en la senlimaj ebloj de progresado en la homaro, jen resume la esenco de tiu ideologio, kiu formiĝis kvazaŭ el la kunfluo de la diversaj novaj tendencoj kaj kiu konkeris al si la suprajn tavolojn de la socio en la 18-a jarcento.

Disvastigita en Francujo de Diderot, de Voltaire, kaj de J.J. Rousseau, tiu kampanjo kontraŭ la nesciado kaj la fanatikeco por politika kaj religia liberalismo tuj transiris Rejnon kaj havis decidigan efikon en la tiamaĵ Germanujoj: ĝi nutradis tiel malsamajn spiritojn kiel Emmanuel Kant, Ephraim Lessing aŭ Moses Mendelssohn.[...] Oni pli bone komprenas, kiam oni memoras la deklaron, kiun en 1905 Zamenhof faris al sia amiko Michaux: "Mi de la plej frua infaneco fordonis min tutan al unu ĉefa ideo kaj revo — al la revo pri la unuiĝo de la homaro." Vere, ke Zamenhof donis al ĝi hebrean formon en siaj projektoj interreligiaj "hilelismo" aŭ "homaranismo"; sed, senigite je tiu okaza vesto kaj reduktite al sia esenco en la fama "interna ideo", ĝi estas ja nenio alia ol la

kritikanto, la kosmopolito Gottfried Wilhelm Leibniz. Ĉe Lejbnico, pli klare ol ĉe la aliaj filozofoj, evidentiĝas la strikta ligiteco, kiu en la ĝenerala tiama opinio ekzistis inter ia tolerema diismo, la homa strebado al la paco kaj la perfektigo de universala lingvo. Jen ekzemple, kion li asertis en la fino de unu franclingva manuskripto, kuŝanta en la Biblioteko de Hanovro kaj publikigita de Couturat nur en 1903: "Kiam ĉi tiu projekto (de universala lingvo) estos efektivigita, nur de la homoj dependos ilia feliĉo, ĉar tiam ili disponos ilon, kiu tiom servos al la plialtigo de la prudento, kiom la teleskopo servas al la plifortigo de la vidkapablo... Kaj la religio certigas al mi, ke la amo al Dio konsistas en arda deziro havigi la komunan bonon, kaj la racio diras al mi, ke nenio pli helpas al la komuna bono de ĉiuj homoj ol tio, kio perfektigas ties prudenton." Komparu kun la eldiroj de Zamenhof, ke "la tuta afero Esperanta estas unu parto de tiu komuna ideo, kiun mi nomas hilelismo", kiu hilelismo "devas prezenti nur pacigan ponton inter la diversaj religioj, tiel same kiel Esperanto prezentas ponton inter la lingvoj" — kaj ke, aliflanke "la tuta problemo de la unuiĝo de la homaro kaj de la malapero de la intergenta malamo koncentriĝas en unu sola afero, la uzado de lingvo *neŭtrala*" — kaj vi tuj rekonos la kontinuecon kaj la kunapartenecon de tiuj tri idealoj de la klerismo. Certe Zamenhof, kun siaj propraj hebreaĵoj trajtoj, digne okupas sian lokon en la seninterrompa vico de la grandaj figuroj de tiu eŭropa movado. [...]

Klera ekvilibreco de Zamenhof

Antaŭ la problemo de neŭtrala lingvo la sinteno de Zamenhof estis markita de klera ekvilibreco; kaj por tion bone kompreni, ni devas atenti, ke la heredaĵon de la antaŭaj jarcentoj li ricevis per tri vojoj, la filozofia, la filologia kaj la medicina. Per la unua transdoniĝis al li la ideo, ke la dezirata lingvo devas prezenti racian strukturon kaj obei la leĝojn de tiu "ĝenerala gramatiko", kies ĉefa kriterio estas la klareco. Per la vojo filologia li akiris ian rafinitan senton pri la sonkvalito de la vortoj, ian delikatan takson de la ĝustaj esprimrimedoj. "La homa lingvo", li skribis al Michaux en 1905, "estis por mi ĉiam la plej kara objekto en la mondo" — kaj al tiu pietato* certe estas ŝuldataj la harmonio de Esperanto, la kohereco de ĝia fonetika materialo, la fleksebleco de ĝia vortkonstruo kaj frazarango. Per la vojo medicina fine li lernis, ke la vivantaj estaĵoj neniam submetas sin al absoluta reguleco, ke ili havas sian propran strukturon, neniam perfekte asimileblan al la strukturo de alia individuo, ke oni devas trakti ilin singarde kaj antaŭ ĉio respekti ilian vivimpulson, vitalan elanon**. De tie venis lia konvinko, ke la iniciatoro devas doni nur la nepre necesajn baz-elementojn kaj lasi ĉion alian al la natura disvolviĝo de la lingvo en la spiritoj de la diversnaciaj adeptoj, lia konstanta deteniĝo en la formulado de lingvaj konsiloj, lia toleremo antaŭ la esperantaj idiotismoj, lia malinklino al redaktado de

* "pietato" = sindona amo. (red.)

** "elano" = impeto. "vitala elano" = la esenco de la vivo mem (laŭ Bergson). (red.)

MODERNA PENSO

GASTON
WARINGHIEN

konkretiĝo de la idealo, kiun jam de tri jarcentoj kovadis la klerismo. Kaj hodiaŭ, kiam ni ĉeestas tiun vastan penadon de la homaro al sia unuiĝo, samtempe sur la politika kampo en tiu aŭdaca, apenaŭ naskiĝanta kaj malfortika, sed tamen plena je promesoj, Organizo de la Unuiĝintaj Nacioj, kaj sur la religia tereno, kie multiĝas la provoj de unuiĝo de la eklezioj en ia ekumenismo, kiun certaj eĉ volus ne limigi al la kristanaj, — kiu kuraĝus negi, ke Esperanto estas, kiom la nemalhavebla rimedo de tiaj unuiĝoj, tiom la vera kaj aŭtenta produkto de tiu longega revo de la modernaj pensuloj?

Unua tereno por la racio

Estis cetere alia objekto, al kiu la kartezia metodo povis tuj aplikigi, kaj pri kiu Kartezio mem okaze okupiĝis. Se la racio devas regadi ĉiujn niajn mensajn procedojn kaj operaciojn, la unua tereno, en kiun ni devas ĝin enkonduki, estas tiu rimedo esprimi kaj interligi niajn pensojn, kia estas la lingvo. Oni ja scias, ke jam en 1629, okaze de ia enigmoforma propono de "nova lingvo", Kartezio skribis al pastro Mersenne leteron, en kiu li skizas unuflanke la ĉeftrajtojn de raciigita lingvo (morfologio sen esceptoj, vortfarado per afiksoj ktp.) kaj aliflanke la principon de ia filozofia lingvo (ordigo kaj analizo de ĉiuj ideoj, tiel ke de la pli simplaj oni venu al la pli kompleksaj, paraleligante la vortkunmetadon al la ideo-sintezo). Tiujn du rapide ĵetitajn skizojn pli vaste elvolvis tiu, kiu estis komence lia disĉiplo kaj poste lia



Michaux:
al li Zamenhof
konfidis siajn
revojn.

Esperanto en la evoluo de moderna penso

(daŭrigo de p. 85)

plena gramatiko kaj lia fido al la valoro de la ĝenerala uzateco. [...]

Grandaj reformoj ofte trans jarcentoj

Sed, se vere en Esperanto enkarniĝis la idealoj de la plej kleraj pensuloj el la lastaj jarcentoj, kiel do okazis, ke Zamenhof kaj lia lingvo renkontis tiom da kontraŭstaroj kaj ke Esperanto ankoraŭ nun restas tiel malproksime de la venko?

Oni devas unue konscii, ke proklami la rajtojn de la racio kaj enkonduki ilin en la ĉiutagan realaĵon estas du tre malsamaj aferoj. La forto de la tradicio, la implikiteco de la rutino, eĉ la pezo de la antaŭjuĝoj estas la cemento, kiu tenas la homojn kune en unu socio, multe pli ol la prudento aŭ la rezonoj; kaj la plej malgranda ŝanĝo en la kutimoj, moroj aŭ mitoj aspektas tiel mondsdua, ke multaj ĉiam timas, ke la ĉielo falos sur ilian kapon. Ni memoru ekzemple, ke la matematike ĝusta kaj socie bonvena reformo de la gregoria kalendaro de 1582 estis akceptita de Anglujo nur en 1752, de Rusujo nur en 1918; la astronomian malkovron de Galileo pri la rondiro de la planedoj ĉirkaŭ la suno estis permesite instrui en Romo nur en 1822; la abolicio de la sklavigado, kiun Grotio kiel la unua postulis kiel juran rajton post dek ses jarcentoj da kristanismo, estis proklamita en Anglujo nur en 1833, en Francujo nur en 1848, en Usono nur en 1865 — kaj ni ĉiuj scias, ke ĝi ne tute malaperis de sur la supraĵo de la tero; la alia granda penso de Grotio, la starigo de internacia arbitracia kortumo, realiĝis nur en 1899 — kaj sub kiaj limigitaj kondiĉoj! Interspaco de du aŭ tri jarcentoj ŝajne estas necesa, por ke tiuj evidente bonfaraj reformoj ricevu komencon de efektivigo. Kaj nia Esperanto estas ape-naŭ okdekjaraĝa!

Ideo, kiu profunde ŝokis

Sed pri Esperanto kontraŭefikis ankoraŭ aliaj faktoroj. La ideo rigardi lingvon kiel simplan ilon de la homa aktiveco, konsideri, ke same kiel ĉiuj aliaj iloj ĝi estas reforĝebla, perfektigebla kaj raciigebla, tiu ideo profunde ŝokis kaj ankoraŭ nun ŝokas la ordinaran homon. La lingvo, kiun ni lernas de nia patrino kaj uzadas kun niaj samgentanoj, aspektas al ni kiel kara heredaĵo, tute ŝarĝita de la memoro de niaj antaŭuloj, plene sorbinta la pasiojn kaj revojn de la forpasintaj generacioj, tiel ke tuŝi al unu el ĝiaj plej bagatelaj detaletoj ŝajnas neelportebla sakrilegio. Ni ĉiuj konas francojn aŭ anglojn, kiuj rigardus eĉ iometan raciigon de la freneza ortografio de sia lingvo kiel nacian katastrofon kaj perfidon al la patrujo. Estas vere, ke grandaj genioj kiel Kartezio aŭ Lejbnico ne atentis tiajn sentimentalajn, nelogikajn antaŭjuĝojn; sed tiajn ili povis malŝati, ne detruiri. Estas tute komprenebla afero, ke la kleruloj kaj des pli la publiko atendu antaŭ tiel grava kaj senprecedenca entrepreno, ĝis la proponita lingvo faros la pruvon pri sia taŭgeco, vivkapablo kaj elproviteco. Sed plejofte ilia

sinteno antaŭ lingvo internacia estas ne ia atenda kaj kritika observado, sed simple ia principa rifuzo de ekzamenado. Nin ne tre mirigas, ke en 1885 la volapukisto Leopold Einstein povis skribi: "Eĉ en sferoj, kie ni devus ĝin atendi la plej malmulte, ni renkontas la antaŭjuĝon, ke enkonduki unu lingvon por ĉiuj homoj estas simple afero neebla." En tiu tempo, kvar jarojn post la publikigo de *Volapük* kaj du jarojn antaŭ la apero de Esperanto, ni volonte senkulpigus tiujn negativulojn. Sed kio plej klare mezuras la pensrutinon de la publiko antaŭ la demonstrado de la faktoj, estas ekzemple tiu okazaĵo, inter multaj similaj. En 1959, en la tempo, kiam jam 44 universallaj kongresoj de Esperanto sin sekvis unu al alia, kiam UEA jam fariĝis konsulta membro de Unesko, troviĝis unu germana lingvisto, d-ro Mario Wandruszka, profesoro ĉe la universitato de Tübingen, por sole deklari, en prelego farita antaŭ la asocio de belgaj min-inĝenieroj kaj poste publikigita en la 13-a volumo de la *Revue universelle des mines*, jenan azenaĵon: "La homo estas kapabla inventi la plej lertajn kodojn...sed la plej kapturaj eblaĵoj sur la tereno de la kodoj neniam permesos al la homo inventi kaj viviĝi unu homan lingvon vere vivantan." Jen kio plej bone klarigas la malrapidecon de niaj antaŭenpaŝoj, multe pli bone ol la difektoj — veraj aŭ supozitaj —, kiujn la elpensantoj de novaj projektoj atribuas al Esperanto!

Malfido de la granda publiko

Nia sola malamiko [...] estas la malfido de la granda publiko kontraŭ ĉia lingva novaĵo; kaj ĝin ni povos superi nur per la fondado de propra tradicio, per la konstanta demonstrado, ke ni vivas kaj aktivis, per senmanka eltenado trans la jardekoj kaj, se necese, trans la jarcentoj. Ni ne faru al ni iluziojn pri la apogo de la registaroj: la lingvon internacian ili oficialigos, ĝuste kiam ĝi ne plu bezonos ilian agnoskon, ĉar ĝi estos jam uzata de ĉiuj homoj kaj sur ĉiu kampo. Ni ne faru al ni iluziojn pri la facileco propagandi la esperon, kiu kuŝas en niaj koroj same kiel en la nomo mem de nia lingvo. [...] Ŝajna paradokso: en la tempo, kiam multiĝas la atingitaĵoj de la scienco, tiam malkreskas la emo pensadi libere kaj racie. Iu ajn semajna revuo malfermas siajn paĝojn al la ĥimeroj de la fakiroj, astrologoj kaj aliaj ĉarlatanoj senkompareble pli facile, ol al studoj pri la malsato en la mondo aŭ al la batalo kontraŭ la nesciado, — mi eĉ ne parolas pri la problemoj de la lingvoj. Kaj tamen, se ni volas, ke tiu ĉi estu iam solvita, ne ekzistas por ni alia vojo ol la persona klopodado en ĉiuj medioj, ol la pacienca, persista kaj penplena varbado de novaj samideanoj. Ĉio, kio estas farata en ĉi mondo, diris Lutero, estas farata per espero. Kaj la ekzemplon montris al ni Zamenhof: neniam li konsentis cedi al pesimismo; al ĉiuj batoj de la sorto li respondis per pliaj fortostreĉoj; kaj ĝis la fino, en la plej tragikaj cirkonstancoj, li konservis neŝancelebla sian fidon al la lingvo internacia kaj al la intergenta paco — luma idealo, kiu trans la franca, la germana kaj la hebrea prismoj, orientis lian spiriton kaj bruligis lian koron, kaj kiu restas plu por ni, liaj disĉiploj, la plej potenca instigilo kaj refortigilo en nia longa, longa provado akceptigi al babeligita homaro la savan rimedon de interkompreniĝo.



Galilei:
ne sanktaj tekstoj,
sed demonstroj.

Literuma alfabeto por radioamatoroj

Ĉiu, kiu iam literumis nomojn telefone, bone scias, kiom necesas literuma alfabeto konsistanta el klare distingeblaj vortoj aŭ silaboj. Bunnie Chambers raportas ĉi tie pri provoj de tia alfabeto sur la kampo de amatora radiofonio. Ĉar tiu medio mem estas preskaŭ tute anglalingva (90% de ĉiuj radioamatoroj troviĝas en anglalingvaj landoj), ne estas mirige, ke lia propono montras fortan influon de tiu direkto. Tio en si mem tamen ne bezonas esti manko...

BUNNIE J. CHAMBERS
(KH6GT)

Taŭga universala literuma alfabeto estas urĝe bezonata inter radioamatoroj esperantistaj por anonci radioidentsignojn kaj por literumi lokojn kaj nomojn en radiokontaktoj kun neesperantistaj stacioj. Nia Esperantista Radio-Rondo de Pacifiko frue eltrovis, ke nek la alfabeto de UEA (Jarlibro 1970) nek la oficiala alfabeto de la Internacia Telekomunika Unuiĝo (I.T.U.) tute taŭgas por kontaktoj kun neesperantistaj stacioj, kvankam kelkaj vortoj de ambaŭ estas tre oportunaj.

Ducent vortoj provitaj

Pro tio ni komencis ampleksan provadon pri literumaj vortoj. En tiu provado ni preparis listojn de provotaj vortoj en alfabeto malordo, kaj legis ilin al neesperantistaj stacioj, ripetante ĉiun vorton nur unufoje, kaj petante, ke la stacioj respondu al ni per la komenclitero de ĉiu vorto. Ĉiu vorto, kiu sukcesis malpli ol 90% en serio de provoj, estis anstataŭita de nova vorto, kaj la provado rekomenciĝis kun nova stacio. Por ke memoro ne erarigu la rezultojn, ni provis nur unufoje kun ĉiu stacio. Entute ni provis 200 vortojn kun 150 neesperantistaj stacioj diverslandaj.

En provoj de la vortoj de la alfabeto de la Jarlibro malsukcesis: Doktoro, Elemento, Fabriko, Gumo, Insekto, Jubileo, Kilogramo, Legendo, Naturo, Omnibuso, Papero, Salato, Vulkano kaj Zinko.

La alfabeto de ITU

La literumaj vortoj de I.T.U. (tiu sama organizaĵo, kiu jam en la 1925-a jaro akceptis Esperanton kiel "klaran", t.e. neĉifran, lingvon por internaciaj telegramoj) fartis iom pli bone. Nia esploro malkovris, ke kvankam tiu ĉi alfabeto estas vaste diskonigita *skribe* inter radioamatoroj, manko de universala fonetika skribo malhelpis diskonigon de la oficiala prononco de kelkaj el ĝiaj vortoj. Ekzemplo estas la hispana kaj esperanta Tango por litero T. Se oni prononcas ĝin hispane aŭ esperante, ĝi estas tro ofte miskomprenita kiel "kango" (*Congo*) por litero C. Notu, ke la "signifo" de literuma vorto en diversaj lingvoj tute ne gravas. Gravus nur, ke la "sonformo" estu simila en pluraj lingvoj, ke vorto donu la ĝustan komencliteron al aŭskultanto, kaj ke ĝi estu Esperantovorto. Escepto estas la neesperantaj literoj Q W X Y. Por tiuj ĉi literoj la vortoj de I.T.U. sukcesis bone, escepte de *kebek* (Quebec), kiun ni devas prononci angle *küebek* por sukcese signi literon Q. Iam


uzita *zajlofon* (Xylophone) por X tre malsukcesis.

Tabelo de nia esperantigita variaĵo de la alfabeto de I.T.U. estas ĉi-apude. La procentoj montras la sukceson de la vortoj en niaj provoj. La nesubstantivaj finaĵoj, eĉ la elizio, estas necesaj por plej bona kompreno.

Redakcia noto: Krom la eksperimentata propono de s-ro B.J. Chambers, estas alia literuma alfabeto por radioamatoroj proponita de s-ro Geraldo Pádua (PY4BBT) en Brazilo. Ni ĉi tie prezentas la komparan tabelon por plua eksperimentado inter la radioamatoroj. Proponojn kaj kritikojn oni rekte skribu al aŭ priparolu kun la koncernaj proponantoj.

Proponitaj de			
	Chambers	Pádua	UEA-Jarlibro
	(%)		
A	alfa 97	alfo	asfalto
B	brave 95	bravo	barbaro
C	cigareto 91	cento	centimetro
Ĉ	— —	ĉefo	ĉefo
D	delta 100	delto	doktoro
E	eko 100	eño	elemento
F	floro 96	fokstroto	fabriko
G	galono 94	golfo	gumo
Ĝ	— —	ĝojo	ĝirafo
H	hotelo 96	hotelo	hotelo
Ĥ	— —	ĥaoso	ĥaoso
I	indiana 100	indio	insekto
J	juliet' 90	julio	jubileo
Ĵ	— —	ĵuro	ĵurnalo
K	kilo 98	kilogramo	kilogramo
L	luna 96	limo	legendo
M	maŝino 97	mikaelo	maŝino
N	novembro 97	novembro	naturo
O	oktobro 100	Oskaro	omnibuso
P	papa 100	papo	papero
Q	küebek' 100	kuo	kuo
R	rekordo 96	Romeo	rekordo
S	sofa 94	seĝo	salato
Ŝ	— —	ŝako	ŝilingo
T	triumfo 94	tango	triumfo
U	uniformo 94	uniformo	universo
Ŭ	— —	uniformo-hoko	universo-hoko
V	viktoro 91	Viktoro	vulkano
W	ŭiski 100	ĝermana vo	ĝermana vo
X	eks-rej —	ikso	ikso
Y	janki 100	ipsilono	ipsilono
Z	zuluo 97	zuluo	zinko

Rekomendebla, se lerni per eraroj



Recenzas Kálmán Kalocsay (Budapeŝto):

Perfektiga kurso: Plena traktato pri la sintakso, de Daniel Quarello. Buenos Aires: la aŭtoro, 1970. 199 p. 20 cm.

Certe bonvenus kompendio de tia amplekso por ekprogresantoj, al kiuj *Plena gramatiko* povas ŝajni tro ampleksa. Nur tiasence estas trafa la aserto de la aŭtoro, ke lia libro plenigas "vakuon neniam ŝtopitan". Cetere, li konas *Plenan gramatikon*, transprenas el ĝi kelkajn terminojn (predikativo, prepozitivo); tiom pli kurioze estas, ke li faras dikajn termin-erarojn, intermiksante deklinaciajn kazojn kun sintaksaj funkcioj. Ekzemple, li parolas anstataŭ "subjekto" (Fundamenta vorto!!!) pri "nominativo" kaj anstataŭ "fraz-objekto" aŭ "rekta komplemento" (vd. P.V.) pri "akuzativo". Tio kaj similaĵoj naskas konfuzojn precipe en la formulado de reguloj kaj difinoj. "Ĉiuj prepozicioj postulas la nominativon" — diras la 8-a paragrafo de la Fund. Gramatiko. La studinto de ĉi tiu libro tion komprenos tiel, ke ĉiu prepozicio postulas — subjekton.

Pro spacomanko mi povas listigi erarojn nur specimene. "Mi raziĝas dum ĉiu dua tago" signifas raziĝojn, kiuj daŭras plenajn 24 horojn. "Po dusemajno viziti" signifas nenion. "Fare la ministron" estas malebla formo anstataŭ "fare de...". "Trans de", "ĉirkaŭ de", "kontraŭ de" estas neuzeblaj prepoziciokunmetoj. "Pereigi de glavo" estas malĝusta anstataŭ "per glavo". La "interna akuzativo" estas konfuza nocio, miksanta aferojn heterogenajn. Kial "atributo" anstataŭ "epiteto"?

Anstataŭ publikigi kape de la libro ies nefermitan leteron, kiu laŭdas la verkon ĝisĉiele, kial ne prefere kontroligi ĝin per alilingvano?

La valoro de la libro kuŝas en ĝia riĉa ekzemplaro, en kiu ankaŭ la eraroj estas malpli oftaj ol en la "teoriaj" lokoj kaj nebule formulitaj reguloj. Tial la libro estas tamen rekomendebla, se oni uzos ĝin gvidate de sperta esperantisto, kiu, helpe de Plena Gramatiko, korektos la termin-erarojn kaj eliminis la individuajn kapricaĵojn. Tia korektado eĉ povas esti tre instrua kaj por la instruatoj kaj por la instruanto.

Mendu ĉe UEA: 21,60 gld. + sendokostoj 10%.

Libro atestanta la misuzon de la scienco

Recenzas Ken Thomson (Usono):

Atombomba malsano; facila enkonduko por laikoj. Kompilis d-ro R. Zivago. Hiroŝima: Hiroŝima Rondo Harmonia, 1970. 24 p. Mimeo. 26 cm.

La forpaso de pli ol kvarono de jarcento jam mildigis la ŝokon de la atombombaj masakroj en Hiroŝima kaj Nagasaki. Kvankam dekmiloj mortis kiel rekta rezulto de la katastrofoj, eĉ pli multaj postvivis la epizodon spertinte aŭ timante "atombomban malsanon" (esprimo uzata por diversaj malsanoj kaŭzitaj de nukleaj radioj).

Kvin kuracistoj verkis dek tri ĉapitrojn pri la diversaj malordoj: kancero kaj leŭkemio, mallongiĝo de vivdaŭro, nebuliĝo de la okula lenso, malrapida resaniĝo de radiita kaj brulvundita haŭto, nenaskipovo, kaj misformiĝo de infanoj.

La verko portas la subtitolon "facila enkonduko por laikoj"; bedaŭrinde, kaprica ellaso de klarigoj de pluraj medicinaj terminoj kaj mezurkvantoj, parte pardonebla en verko tiel mallonga, malhelpus multajn legantojn. Ŝajne, la aŭtoroj laboris sendepende; oftas ripetoj, kaj mankas resumo de la tuto. Abundigas lingvaj kaj literumaj eraretoj.

Ni preterrigardu la mankojn — la libro bone atestas pri la misuzo de la scienco en la servo de nia vera malamiko, la milito mem.

Mendu ĉe UEA: Prezo anoncota.

Nesufiĉa sugestopovo de hajkoj

Recenzas Baldur Ragnarsson (Islando):

Kapriĉo '70. Diversaj aŭtoroj. Oosaka: Hajkista Klubo, 1970. 52p. 18cm.

Krom sia karaktero de kurto, la japana *hajko* devas, laŭ difino, ankaŭ prezenti klaran bildon povantan vekti emocion aŭ sugesti nediritaĵon. Plej laŭdata trajto de la japana poezio estas ja ĝia sugestopovo. Vere bona poemo, precipe se temas pri hajko, devas trovi sian finon ĉe la leganto mem. Sugestaj bildoj estas ja troveblaj en la ĉi-koncerna hajkaro de japanaj esperantistoj:

*En sol' vespere
trankvilas mi kun libroj.
Ĉu neĝ' ekstere?*

— Ueyama masao

*Jam arboj nude,
foliojn mi kolektas, —
nepin' apude.*

— Murata keinosuke

Ofte, tamen, la sencoj sidas supraĵe kaj ne aludas direktojn stimulantajn la exploremon de la leganto. Rakontema maniero, fremda al la japana poezio, ankaŭ ofte malhelpas sugestan subtilecon. Tamen, supozeble, por iuj tiun mankon malpli sentigas la ĝenerale neta formulado de la versoj.

Mendu ĉe UEA: 1,20 gld. + sendokostoj 10%.

Universala satiro pri homa naturo

Recenzas F. de Diego (Hispanujo):

La besto-farmo, de George Orwell. Trad. Gerald Tucker. Munkeno: Lanterno, 1970. 95 p. 17 cm.

La amara, tamen ĉarma rakonto de Orwell disvolviĝas kiel proza fablo: preskaŭ ĉiuj roluloj estas bienobestoj. Iun tagon ili ribelas kontraŭ la reganta kaj ekspluatanta homo kaj lin venke batas.

La animaloj organizas sin en socion sen privilegio kaj kasto kaj laboras nur por la komuna bono. Tamen, la ruzaj kaj aŭdacaj bestoj iom post iom trudas sin per kvereloj, perfidoj, koluzioj kaj murdoj, dum la humilaj kaj simpl-animaj, premataj per senkompata disciplino, falas denove en sklavan vivon.

Pli ol satiron kontraŭ difinita politika sistemo, la libro prezentas la seniluzian, klasikan doktrinon, ke la homo, pro la limigoj de sia naturo, ne kapablas rompi sian fatalan rondiradon nek salti trans sian propran ombron.

La bona traduko de s-ro Tucker legiĝas facile, kvankam lia stilo pli gajnus, se li estus evitinta nombron da superfluaĵoj, pezaj verbotempoj kompleksaj. En la paĝo 11-a aperas "determineco" anstataŭ "decido".

Mendu ĉe UEA: 6,— gld. + sendokostoj 10%.

Tro da ŝanĝoj


Recenzas W.J. Nijveld (Amsterdam):

Esperantaj normoj — Kemio-00001: Ĝeneralaj terminoj, de Jan Pióro. Warszawa: Pola Esperanto-Asocio, 1970. Mimeo. 43 p. 30 cm.

Tiu ĉi verko estas ĝenerala nomenklature pri organika kaj neorganika kemio en Esperanto. En la januaro-numero ni recenzis de la sama aŭtoro nomenklaturon pri fermentoj. Estus logike, se la nuna verko estus recenzita en la unua vico, sed bedaŭrinde la recenzanto ricevis ĝin tri monatojn poste.

La aŭtoro ne kontentigas sin per kolektado de jam ekzistanta lingvo-uzo sed klopodas iugrade reguligi ĝin. Tiel li rezervas la finaĵon -io por la kemiaj elementoj. Tio kondukas al nomoj kiel *oksigenio*, *ferio*, *argonio* ktp. anstataŭ la konataj oksigeno, fero, argono ktp. En organika kemio li enkondukas nomojn por grupoj, kiel *meto*, *eto*, *fero* apud tiuj por la samformulaj radikaloj (metilo, etilo, fenilo). Eble tiaj novaj formoj povus plibeligi Esperanton el vidpunkto de reguleco, sed ili iom strange impresas al tiuj, kiuj jam praktike uzis Esperanton; cetere ili ankaŭ devias de tiuj, kiuj troviĝas en *Plena Ilustrita Vortaro* aŭ en la Fundamento.

Ĉar la ŝanĝoj okazas ĝuste ĉe nombro el la plej oftaj terminoj, oni povas atendi, ke tio renkontos multan kritikon.



Brazila filologo prof-o Pandiá Pându (meze), aŭtoro de 12 gramatikaj libroj kaj tradukinto de hinda klasikaĵo "Bhagavad-Gitâ", verkis novan libron "Esperanto-Portugala (Konversacio)". Dekstre d-ro Brás Kosenza, maldekstre d-ro Johakimo du Koŭto.

Laste aperis...

aro da nefikciaj libretoj: *Atombomba malsano — facila enkonduko por laikoj* (24 p.), *Klereco por hodiaŭ kaj morgaŭ* (67 p.), libro pri la kleriga sistemo de Germana Demokratia Respubliko, *Jen Londono!*, kolorilustrita bindita libreto pri la kongresurbo ĉi-jara (1,74 gld.), *Ukraina Soveta Socialisma Respubliko* (22 p.) kaj — la plej ampleksa — *La tradicia Vjetnamio*, 170-paĝa libro pri la historio de tiu lando ekde la ŝtonepoko ĝis la komenciĝo de la 19-a jarcento. La firmo FIAT (Propaganda Fako, I-10100 Torino, Corso Marconi N. 10) eldonis du novajn prospektojn pri siaj aŭtomobiloj *124 Special* kaj *124 Special T*.

La ĉefa novaĵo pri-Esperanta estas la delonge atendita apero de *Metodiko de la Esperanto-instruado*, verkita de la forpasinta Rudolf Rakuŝa kaj eldonita en Jugoslavio en kunlaboro kun UEA (189 p., 5,33 gld.). Dana Esperanto-Eldonejo daŭrigas sian novan popularan serion per skeĉaro *Ni komedietas...*, de Zora Heide (2,— gld.). Fine, *Você sabe esperanto?* (Ĉu vi scias Esperanton?) estas grandformata, multobligita lernolibro por kurso en la Universitato de Alagoas, Brazilo.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki la prezon en guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.a. 14% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj.

REDAKTA ARTO GRAVAS EN INFORMADO

R. T. Sandberg

Pri tio, ke parto de la ne-Esperanta gazetaro tute ne raportas pri niaj agadoj aŭ misraportas pri ili, opinias nin mem kulpaj s-ro R. T. Sandberg, profesia redaktoro en Ĉikago (Usono). Ni, informantoj pri kaj por Esperanto per verkaĵoj, — laŭ s-ro Sandberg — kelkfoje donas malbonan impreson al ne-esperantistaj redaktoroj, kiuj en si mem ne havis antaŭjuĝon pri la Internacia Lingvo.



La informado pri Esperanto konsistas ĉefe el du agadoj: (1) la prezentado de materialo al neesperantistaj redaktoroj por aperigo en ties gazetoj, ĵurnaloj, enciklopedioj, radio-disaŭdigoj k.t.p., kaj (2) la redaktado de materialo por aperigo en niaj propraj informaj eldonaĵoj. Ĉi tiu artikolo donos konsilojn laŭvice pri tiuj du egale gravaj flankoj de sukcesa informprogramo.

1. Informado al neesperantistaj redaktoroj

La publiko ĉiam avide legas interesajn informojn. Tial, redaktoroj ĉiam provas meti tiajn informojn en siajn ĵurnalojn. Kiam redaktoro rifuzas, la kialo probable estas, ke li supozas, ke la informo ne estas vera aŭ ke ĝi ne sufiĉe interesos legantojn kompare kun la aliaj tiam haveblaj informoj. Eĉ kiam li havas iom da dubo pri la ĝenerala intereseco de la informo, li ofte aperigos ĝin en sia ĵurnalo *se ĝi estas profesie prezentita*.

La leciono por Esperantaj informadistoj estas *ĉiam agi profesie*. Tio signifas, ke oni devas ne manskribi manuskriptojn. Ili devas esti bone tajpitaj, kun duobla spaco inter la linioj, kun larĝaj marĝenoj kaj sen manskribitaj korektaĵoj aŭ aldonoj. Oni devas verki pri Esperanto en senerara nacia lingvo. Oni devas ne uzi en nacilingva teksto esperantajn esprimojn, ekz. "samideano", "Majstro", "verdstelanoj" k.s.*, nek traduki ilin en nacilingvaĵon nekompreneblan ĉe la legantaro. (Ekzemple, kiam oni tradukas "postkongreso"-n en la anglan lingvon kiel "post congress", la leganto komprenos "poŝtkongreso"-n aŭ "militbazkongreso"-n, sed nepre ne la ĝustan signifon.)

Multaj antaŭjuĝoj, kiujn havas redaktoroj kontraŭ Esperanto, kredeble kreskis el tiaj eraroj. En multaj landoj, la plejparto de la redaktaro ne havas antaŭjuĝojn kontraŭ Esperanto, ĉar ili neniam aŭdis aŭ preskaŭ nenion scias pri Esperanto. La antaŭjuĝoj, kiujn ili havas pri Esperanto, probable estos la rezulto de viaj eraroj. Kiam redaktoro ricevas neprofesie preparitan artikolon pri Esperanto, li ne nur havas malbonan impreson pri tiu artikolo, sed li ankaŭ ekhavas malbonan antaŭjuĝon kontraŭ la lingvo mem.

2. Redaktado de priesperantaj informaj eldonaĵoj


Redaktoro regas, pli rekte ol iu alia persono, la enhavon de ĵurnalo aŭ gazeto. Li ordinare faras tion precipe per la *elektado* de la plej taŭga materialo por sia eldonaĵo kaj per la *adaptado* de tiu materialo laŭ la celoj de tiu eldonaĵo.

Li ofte ankaŭ regas la formon de la eldonaĵo: la speco de papero, sur kiu oni presas ĝin, la preslisterstilon k.t.p. Tiaj aferoj dependas plejparte de la kvanto de mono havebla. Konsilinde estas ŝpari monon alimaniere, ol per la malaltigo de la kvalito de la eldonaĵoj, kiuj trafos la okulojn de la publiko. Same kiel la nacilingvajn redaktorojn, ankaŭ la publikon imponos profesie prezentata materialo.

* Vd. "Por pli efika informado (3)", Ivo Lapenna, "Esperanto", februaro 1971, p. 27.

Por pli efika informado (5) PRI KIO INFORMADI ?

**Grava tasko liveri
objektivajn sciigojn
estas modele farata
de CED per ĝiaj
dokumentoj**



**IVO
LAPENNA**

Por altigi la kvaliton de nia informado estas necese akcenti ĉion, kio montras la kulturan kaj praktikan valorojn de la Internacia Lingvo. Se oni konsideras la ĉiaspecajn obstaklojn, kiujn renkontis ĝia disvastiĝado tra la mondo — antaŭjuĝoj, foresto de financaj rimedoj, nacia ŝovinismo kaj faŝismo, militoj kaj aliaj internaciaj streĉitecoj — la atingoj de Esperanto estas elstare grandaj, multrilate vere admirindaj. Bedaŭrinde, pri tiuj atingoj la vasta publiko apenaŭ ion scias. Eĉ kleraj personoj havas preskaŭ nenan aŭ, en la plej bona kazo, nur mankan kaj tial deformitan bildon.

Grava tasko de niaj informaj fakoj estas liveri objektivajn sciigojn kaj klarigojn pri la Esperanta traduka kaj originala literaturo, sciencaj verkoj, Internacia Somera Universitato, belartaj kaj oratoraj konkursoj, gazetaro, radio-elsendoj, delegita reto, aplikoj de la lingvo dum vojaĝoj kaj en profesia laboro, internaciaj kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj ktp. La atingoj de Esperanto estas tiel multnombraj kaj en kelkaj sferoj tiel vastaj, ke la problemo certe ne estas kion diri, sed prefere kiel elekti la plej interesajn kaj plej gravajn aspektojn. CED faras utilan laboron ankaŭ tiurilate. Ĝiaj dokumentoj estas regule sendataj al ĉiuj landaj asocioj, al la informaj fakoj, Esperantaj fakoj de radio-stacioj. En ili troviĝas abunda materialo kun objektivaj faktoj. Necesas nur utiligi ilin eĉ pli multe ol ĝis nun por la celoj de informado. Tio helpas al plibonigo de ĝia kvalito.

Kiel redaktoro de Esperanta gazeto aŭ bulteno, vi kredeble eldonos plejparte artikolojn verkitajn de neprofesiaj aŭtoroj. Tiaokaze, vi devos esti ne nur redaktoro, sed ankaŭ verkisto. Vi devas ne nur korekti gramatikajn erarojn sed ankaŭ okupiĝi pri efika reorganizado de la enhavo de originalaj artikoloj. Ju malpli spertaj la aŭtoroj de la originalaj artikoloj, kiujn vi intencos publikigi, des pli estos bezonata via laboro kiel verkisto-redaktoro. Ju pli spertaj la aŭtoroj, des malpli pezaj estos viaj laboroj. Por ludi vian rolon plej efike, vi devos memori, ke la plej efikaj artikoloj kaj rakontoj en popularaj gazetoj:

(1) Kaptas la intereson de la legontaro per la titolo kaj la unua frazo.

(2) Tenas la unuan intereson de la legantaro per la prezentado de la plej trafaj faktoj unue. La malpli trafaj faktoj kaj detaloj devas atendi, ĝis la intereso de la legantaro estas tute kaptita. Ĉi tiu principo eble ŝajnas memevidenta, sed ĝi estas ofte forgesata.

(3) Ofte tenas la kaptitan intereson de la legantaro per demando, al kiu oni ne respondas ĝis la fino de la artikolo aŭ rakonto.

Ĉi tio ne signifas, ke oni mensogu aŭ trompu. Ĝi signifas nur, ke la redaktoro devas sin demandi, ĉu la materialo estas organizita kiel eble plej efike. De tempo al tempo, artikolo malmulte legata povas fariĝi aŭvide legata per la rearanĝo de ĝia enhavo, sen la aldono aŭ eligo de iu fakto.

Krom rearanĝi la enhavon, la redaktoro de tempo al tempo devas fari ŝanĝojn por klarigi la enhavon kaj faciligi la legadon de la artikolo. Ekzemple, li devas foje forstreki nenecesajn vortojn aŭ anstataŭigi neordinarajn vortojn per ordinaraj vortoj (kiam tio estas ebla sen ŝanĝo de la signifo de la frazo). Kelkfoje, li eĉ devas forstreki tutan alineon, kiam ĝi ne helpas klarigi la temon de la artikolo. Ordinare, la redaktoro malplilongigas, sed de tempo al tempo li devas plilongigi por plej efike klarigi la enhavon al la legontaro.

Artikoloj prenitaj el profesinivelaj gazetoj supozeble bezonos malpli de via redaktlaboro, ol originalaj artikoloj de nespertaj aŭtoroj. Sed parto de la enhavo de tiaj artikoloj ofte ne rilatas al la temo de via gazeto. Tiaokaze, vi devas elekti nur partojn de tiaj artikoloj. Kiam vi faras tion, vi devas certigi, ke via legantaro scios, ke ili ne legos en via gazeto la tuton de la originala artikolo. Preferinde, vi devas indiki ne nur, ke la originala artikolo estas malplilongigita, sed ankaŭ de kie en la artikolo vi elprenis partojn. Ĉiuokaze, vi devas zorgi, ke la signifo, kiun la aŭtoro intencis, ne estu ŝanĝita. Kaj vi devas indiki al la legantaro, kie ĝi povos trovi la tutan artikolon.

Kiel redaktoro vi estas la lasta persono, kiu aprobas aŭ ŝanĝas la enhavon de via eldonaĵo. Vi faras vian laboron bone, se tiu enhavo, kiel ĝi estas finfine eldonita, estas kiel eble plej informplena, preciza, interesa kaj klara.

PERSPEKTIVOJ DE ESPERANTO

— surbaze de diversaj tempaj premisoj

Al la artikolo de s-ro Baldur Ragnarsson "La ĉefa obstaklo al Esperanto estas psika", aperinta en la februara numero (p. 23-24), venis reagoj el pluraj kontinentoj.

"Ne la psika sed la ekonomia estas la ĉefa obstaklo. *Parolu usone, aĉetu usone* estas la efika slogano multe subvenciata en Usono, kie la korporacioj nun penas regi la novan satelit-televidan sistemon de monda komunikado." — skribas el Usono s-ro Mark Starr. Li konkludas: "Deklaro, ke Esperanto forpuŝos aliajn lingvojn, ne helpas nin nun en la malfacila tasko venki politikan kontraŭstaron kaj la ĝeneralan inerton pri la internacia lingvo. Intertempe ni ataku ĉian kultur-koloniismon...precipe de la uson-angla lingvo."

Al la ideo de Ragnarsson, ke la vasta enkonduko de la Internacia Lingvo signifos malkreskon de la uzado de la naciaj lingvoj, venis pluraj reagoj. Interalie, el Hindujo s-ro Probal Daŝgupto skribas: "Ke mi klopodas progresigi Esperanton, tio dependas de mia fido al ĝia taŭgo kiel dua lingvo por ĉiuj kaj de mia scio, ke malvastaj lingvoj (kiaj iĝos la etnaj lingvoj ĉe eventuala ĝeneraliĝo de Esperanto) povas vivi kaj flori apud potenca, vasta lingvo."

"Almenaŭ en Francujo," — skribas s-ro Roland Josinet el tiu lando — "la plej granda baro kontraŭ la disvastiĝado de Esperanto estas nomi ĝin la Internacia Lingvo.... Proponi Esperanton kiel *helpan* lingvon estas plej necese en Francujo."


El Sovetunio skribas s-ro D. Kolker, "Se temas pri taktiko, ĝi devas esti varia depende de cirkonstancoj. Ekz-e, en la cirkonstancoj de nia enlanda movado aserti pri estonta anstataŭigo de naciaj lingvoj per Esperanto estus taktike pli maloportune por la movado, ol paroli pri 'helplingvo' k.t.p. Eble en aliaj lokoj kaj medioj la ideoj de s-ro Ragnarsson estas trafaj, sed ni devas orientiĝi je amasa psikologio nuna, kaj ne miksi taktikon kun strategio."

Rilate al amasa psikologio skribas s-ro E.J. Woessink (Nederlando), estrarano de UEA, "Mi konsentas kun la ideo de s-ro Ragnarsson, ke la plej grava obstaklo al Esperanto estas psika. Sed niaj ideoj disiĝas, kiam temas pri la kaŭzo de tiu obstaklo. S-ro Ragnarsson opinias, ke ĝi estas la subkonscia kompreno, ke enkonduko de internacia lingvo malfortigas la naciajn lingvojn. Laŭ mi ekzistas alia pli grava kaŭzo. La plej multaj homoj deziras justecon, sed ili al kutimiĝis al tio, ke sur nia terglobo plej ofte ne venkas la justeco, sed la potenco. Subkonscie ili scias, ke ĝenerala enkonduko de neŭtrala internacia lingvo signifas venkon de justeco super potenco, kaj en tio ili ne povas kredi. Ekzistas homoj, kiuj pensis pri ĉi tiu afero kaj pretas ankaŭ diri, ke pro la nomita fakto ili ne kredas la estontecon de neŭtrala internacia lingvo. Sed, ĉe plej multaj homoj tiu afero vivas nur en iliaj sub-

konscioj. Ili kune estas tiel nomataj realistoj aŭ pragmatistoj, kiuj, pro siaj spertoj, ne pretas kontraŭstari potencajn fortojn. Tiel, grandega parto de la homaro akceptas, ke la lingvo de la nun, laŭ ili, plej potenca popolo, la angla/usona lingvo, ĉiam pli fariĝos la internacie uzata lingvo. Tion ili faras des pli, ĉar ili ne vidas, ke la registaroj de aliaj potencaj ŝtatoj (kiel Sovetunio kaj Ĉinujo) vere farus ĉion por kontraŭstari tiun lingvan superregon."

Por pritrakti la demandon, ĉu Esperanto prezentos minacon al la naciaj lingvoj aŭ ĉu la ĝenerala enkonduko de la Internacia Lingvo grave reduktos la uzon de naciaj lingvoj, oni devus havi ian tempan premison. Iuj parolas pri la afero en la kadro de la nuna epoko, aliaj parolas en la mezuro de estontaj jardekoj, la aliaj en la mezuro de estontaj jarcentoj aŭ jar-miloj.... Estas ne strange, ke oni tre diverse priparolas la aferon, dum oni havas malsamajn tempajn premisojn.

Ŝerce skribas el Usono s-ro Conrad Fisher: "Oni emas 'salti al la konkludo', ke ni esperantistoj intencas aboli aliajn lingvojn. Tiu opinio ĉe la neesperantistoj fortimigas kaj malamikigas ilin. Ne gravas, ke la ebla aboliĝo okazos post multe da jaroj, t.e. post la morto de la personoj, al kiuj ni atentigas pri la Internacia Lingvo," same kiel por ili ne gravas la malvarmiĝo de la suno post iom da bilionoj da jaroj.



LOKE - FAKE - PERSONE

LOKE

Aŭstrujo

- Lige kun la venonta UK, Aŭstria Esperantista Federacio, Societo de Internacia Kompreniĝo kaj Aŭstra-Brita Societo kune organizis filmvesperon, temantan pri Vieno kaj Londono, kongresurboj de UK en 1970 kaj 1971, respektive.

Hungarujo

- La 9-a Somera Esperanto-Universitato okazos ĉi-jare en Gyula de la 4-a ĝis la 10-a de julio. Prelegos, krom hungaraj profesoroj, d-ro Werner Bormann el F.R. Germanujo kaj d-ro Jean-Luc Tortel el Francujo. Aliĝiloj haveblaj ĉe Somera Esperanto-Universitato, 48-as u. 11, Gyula.

Norvegujo

- Populara semajngazeto "Virino kaj vestaĵo" (KK Kvinner og Klær & meget mer) en la numero de la 16-a de februaro 1971 prezentis japanan esperantistinon Tamiko Kaŭakami kaj Japanujon mallonge. La artikolo finiĝas per frazo "Ĉu vi planas lerni la japa-

Filio de Pola Esperanto-Asocio en Jelenia Góra aktivas, krom en la informa kampo, ankaŭ en la klubkunvenoj kun gaja atmosfero, plene utiligante Esperantajn eldonaĵojn. (Fotis: s-ro S. Kiezuń.)



nan lingvon? Estas terure malfacile.... Do Esperanto estas pli reala."

Pollando

- En Międzyzdroje, de la 22-a ĝis la 29-a de junio 1971, okazos Feriado Esperantista. Estos en ĝia kadro ankaŭ Esperanto-kursoj. Informojn donas: Turisma kooperativo "Gromada", Szczecin, Pl. Lotników 7, Pollando.

Svedujo

- En Gotenburgo okazos Internacia Semajno de Amikeco de la 24-a ĝis la 30-a de julio tuj antaŭ la 56-a UK en Londono. Krom la aŭtobusa, boata kaj pieda vizitoj al diversaj lokoj, estos ankaŭ prilingva debato, primovada diskuto ktp. Partoprenantoj povos iri rekte al Londono per komuna ŝipa veturo, kiun aranĝas la organizantoj de la Semajno: "Inter" — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo.

FAKE

Literaturo

- Okaze de la 100-jara jubileo de la poetino Lesja Ukrainka, Ukraina Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando donacis al la Muzeo de Lesja Ukrainka volumeton de ŝiaj esperantigitaj verkoj kaj jubileajn numerojn de *Tra Soveta Ukraino*.

Premio Nobel

- Lastatempe ĉiuj slovakaj radiostacioj elsendis kvarfoje detalan informon pri kandidatigo de UEA por la Premio Nobel por Paco en 1971 kaj pri la signifo de UEA.
- Esperantlingva elsendo de Radio Wien (Aŭstrujo) menciis, en la 17-a de marto 1971, ke UEA aspiras al la Premio Nobel por Paco.
- Ankaŭ en Grekujo raportis pri la kandidatigo de UEA kelkaj ĵurnaloj: Eleftheros kosmos (3.3.71), Apogevmatini (2.3.71), Vradini (27.2.71).

Tendumado

- Al la baldaŭ okazonta Internacia Esperanto-Tendaro en kampadejo Lahti, Isoranta, Pulkkihanharju Karilanmaa, Finnlando (de la 11-a ĝis la 18-a de julio; org. Esperanto-Klubo de Vääksy, p/a T. Sountausta, Vääksy, Finnlando) eksterlandanoj povos partopreni sen kotizo. En la kampadejo funkcios radio-amatora stacio OH3AC.


Turismo

- Aperis la jam anoncitaj etikedoj, eldonitaj de "Monda Turismo: Esperanto" (vidu: *Esperanto*, aprilo 1971, p. 63-4). Estas du specoj: unu por turistaj kofroj kaj la alia por hoteloj, butikoj kaj aliaj turistaj entreprenoj kun teksto "Rekomendata de Monda Turismo Esperanto", kiu lasta estas pli grandformata (12,0 x 12,5 cm) ol la unua (6,7 x 9,7 cm). Ambaŭ estas memgluaj.

PERSONE

Goldsmith

- S-ro Cecil C. Goldsmith, naskiĝinta en 1889 en Britujo kaj funkciinta kiel la ĝenerala sekretario de UEA dum ĉ. 16 jaroj ĝis 1954, lastatempe edziĝis al Lily Jullie en Aŭstralio. Ambaŭ estas membroj de la klubo en Manly, Aŭstralio.



TEJO

TEJO-redaktoro:
Wim Jansen,
Röntgenstraat
32 A,
Vlaardingen,
Nederlando

PER TEJO AL LABORTENDAROJ

Ĉi-jare, kiel kutime, la Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO, NEJO-komisiono, kunorganizos Esperanto-kursojn en diversaj labortendaroj volontulaj. La landoj, kie verŝajne okazos tiuj labortendaraj kursoj, estas Turkujo, Libano, Nederlando, Italujo kaj Finnlando.

En Italujo prizorgos la organizadon de la tendaro kaj de la kurso la itala sekcio de TEJO, IEJ. Ĝi okazos de la 17-a ĝis la 31-a de julio en Roccasecca (centra Italujo). La korespondadreso estas ĉe Nino Vessella, Via Panniglia 54, I-03030 Roccasecca Scalo (Frosinone), Italujo.

Krom pri la itala labortendaro kontraktoj ankoraŭ ne estas finpretigitaj kun la organizantoj de la aliaj labortendaroj. Tial ne eblas menciigi ĉi tie la precizajn periodojn kaj lokojn, nek la nomojn de la organizantoj. Interesitoj bonvolu tamen sciigi pri sia preteco partopreni iun tendaron kiel instruanto kaj/aŭ helpanto, eble ankaŭ kiel debatgvidanto.

Tiun ĉi jaron ni volas iniciati novan procedon por tiuj ĉi jam tradiciaj labortendaraj kursoj, nome laŭ la spirito de la Deklaracio de Tyresö. Kune kun la elementa Esperanto-kurso ni deziras organizi por la partoprenantoj de la labortendaroj debaton pri temoj rilatantaj al la lingva imperiismo. Tiu aspekto de nia kunlaboro vekas grandan intereson ĉe la kunlaborantaj labortendaraj organizaĵoj, kaj la koncernaj kontraktoj mencias tiun faceton de nia kunlaboro.

Por tio necesas iom da materialo (artikoloj, referaĵoj, bibliografio), kiun la Komisiono volonte sendos al interesitoj. Necesas ankaŭ, ke en la instru-ekipo unu persono interesiĝu kaj dediĉu sin al tiu tasko.

Jam nun sugestoj kaj indikoj de artikoloj k.s. estas bonvenaj; la Komisiono ilin utiligos por verki bazan dokumentaron pri la lingva imperiismo. Tiun doku-

mentaron oni sendos al ĉiuj instruontoj de Esperanto por uzo en sia labortendaro.

Tiuj, kiujn interesas debatado pri lingva imperiismo kaj instruado de Esperanto en labortendaro en iu el la menciitaj landoj*, kontaktu la NEJO-komisionon de TEJO, Binnenkant 46, Amsterdam C, Nederlando.

EDINBURGO — URBO DE KULTURO

Ĉi-jare la Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en Edinburgo, ĉefurbo de Skotlando. Edinburgo iam priskribiĝis kiel "Ateno de la Nordo" pro siaj klasika arkitekturo, trankvila etoso kaj abundo da lertuloj en ĉiu kampo de la scienco. Sed pli ĝuste ĝi estas "Edinburgo de la Nordo", ĉar ĝia karaktero estas tute propra. Riĉiĉa pri historio, ĝi estas ankaŭ moderna urbo de komerco, administracio kaj iom da industrio. La Arta Festivalo de Edinburgo estas mondfama. Pasintjare okazis en Edinburgo la Ludoj de la Brita Komunumo. Ĉiu strato, preskaŭ ĉiu domo en la Malnova Urbo, havas sian apartan historion, kaj la "Nova Urbo" estas modelo de novklasika stilo.

La kongresejo mem estas studenta domo, tre komforta kaj adaptita al la tuta programo krom la balo, kiu okazos aliloke. Jam la Loka Komitato strebas aranĝi programon allogan, interesan kaj ĝuindan. Ekster la kongreso mem ekzistas ĉiaj distreblecoj en la urbo: teatroj, kinejoj, ktp. Kaj ĉirkaŭ Edinburgo troviĝas la belega skota kamparo kun siaj lagoj, montoj, kasteloj kaj erikejoj.

La temo de la IJK estas Junularo kaj Kulturo (vidu TEJO-paĝon de la marta numero) — kian perfektan lokon por tia temo! Ĉiufanke oni vidas ekzemplojn de unu kulturo aŭ alia — arkitekturo, literaturo, pentroarto, filozofio, muziko....

Sendube tiu ĉi kongreso estos memorinda!

27-a IJK, 22c Newbattle Terrace, Edinburgh EH 10 4RT, Skotlando, Britujo.

David Kelso, prezidanto de LKK

NE TUTMONDA, SED TUTGALAKSIA

Tutgalaksia Esperanto-Rondo (TERo) estas grupo de 13- ĝis 18-jaraĝaj gelernantoj en kaj ĉirkaŭ Tokio. Lastjare kelkaj Esperanton lernantaj geknaboj en Tokio interkonatiĝis kaj havis de tempo al tempo kunsidojn. Baldaŭ ili komencis aperigi sian bultenon, kiu nomiĝas "Sabotu kaj Rezignu, la Estinteco estas nia!".

Spite al tiu ambicia nomo ni ankoraŭ estas malmultnombraj: ne pli ol 60 membroj. Krome pliparto el ni ne jam bone regas Esperanton, tiel ke nia bulteno estas parte nacilingva. Sed, studante la Internacian Lingvon, ni strebas paŝon post paŝo al plialtigo de nia lingvonivelo.

La adreso de TERo estas ĉe sinjoro Nagata Joŝihumi, Tokio, Matida-si, Hara-Matida 2-11-20, Japanujo.

Hajaŝi Kazuo, redaktoro de TERo

La unua "kunloĝado" de TERo, 29-an de decembro 1970



* En Finnlando ne temas pri vera labortendaro, sed pri eduka tendaro de socialistaj adoleskuloj (10- ĝis 16-jaraj).

KALEN- DARO

majo – oktobro



Majo

- 15 Jarkunveno de neder. asocio LEEN, Arnhem.
- 15-21 Int. fervojista E-kongreso, Maribor, Jug.
- 16 Renkontiĝo de F.R.G., Ned., Belg.: Aachen
- 20 Limdato por loĝmendoj, UK Londono
- 26-8/6 Miela luno 1971, Rimini, Italujo
- 28-1/6 Printempa ferio, Llanaber, Britujo
- 29-31 9a int. markola kongreso, Calais, Francujo
- 29-31 1a markola junularkongreso, Calais, Franc.
- 29-31 53a belga kongreso, Calais, Francujo
- 29-31 42a norvega kongreso, Trondhejmo
- 29-31 Sveda jarkongreso, Stockholm

Junio

- 20 Limdato por aliĝo al UK en Londono
- 28-3/7 Somera universitato en Turku, Finnlando
- 30-4/7 Usona kongreso, San Antonio, Texas

Julio

- 1-14 Ferio-kursoj, Swornigacie, Pollando
- 1-15 Kampadista renkontiĝo, Balaruc-les-Bains, Fra.
- 4-10 Somera E-universitato, Gyula, Hungarujo
- 4-11 Int. Baltmara semajno, Rostock, GDR
- 4-25 Kulturaj semajnoj, Grésillon, Francujo
- 11-18 Int. E-tendaro, Päijänne, Isoranta, Finnl.
- 14-21 Akropolo '71, Athenai, Grekujo
- 17-27 Int. naturamika renkontiĝo, Abaliget, Hung.
- 17-31 E-istaj laborkampoj, Roccasecca, Italujo
- 17-31 Int. mezlerneja feriado, Toruń, Pollando
- 17-31 Int. junula feriado, Toruń, Pollando
- 19-24 31a hispana kongreso, Alicante
- 21-25 Int. E-seminario, Toruń, Pollando
- 24-31 Int. kristana kongreso, Abingdon, Britujo
- 25-1/8 Feria kurso, Helsingør, Danujo
- 25-7/8 Kulturaj, turismaj ferioj, Grésillon, Franc
- 30-6/8 Int. infana kongreso, Romney Marsh, Brit. (aldona libervola restado: 6-13 aŭgusto)
- 31-7/8 44a SAT-kongreso, Parizo, Francujo
- 31-7/8 56a Universala Kongreso, Londono, Britujo

Aŭgusto

- 7-13 Postkongresa ferioestado, Barlaston, Bri.
- 7-14 Postkongreso de la 56-a UK, Dublin, Irlando
- 8-12 Postkongresa ekskurso al Exeter, Britujo
- 8-13 Postkongresa ekskurso al Skotlando, Bri
- 8-14 Int. junulara kong. de TEJO, Edinburgo, Bri.
- 15-4/9 Studsemajnoj, Grésillon, Francujo

Septembro

- 4-10 Itala kongreso, Marina di Grosseto
- 5-11 Eŭropa feriosemajno, Fürigen, Svisujo
- 5-11 TEJO-seminario "Lingvo kaj kulturo", Strasbourg, Francujo
- 17-30 Int. E-ista feriado, Międzygórze, Poll.
- 24-27 Ĉeĥa kaj slovaka renkontiĝo, Vsetín

Oktobro

- 2-9 4a pupteatra festivalo, Zagreb, Jugoslavio
- 17-23 Aŭtunaj feriaj kursoj, Aarhus, Danl.
- 24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj

VANA INSTRUKCIO

En februaro 1971 mortis kelkaj enloĝantoj en la ĉina kvartalo de Novjorko, kiam ilia domo brulis. Laŭ aŭtoritatoj, almenaŭ unu el la mortoj fontis el tio, ke ĉinlingva loĝanto ne komprenis la eskapan instrukcion de la fajrobrigado.

★ ★ ★

VORTOJ DE SENEGALA PREZIDANTO

"Ni devas defendi la francan lingvon, ĉar estus tragedio, se la mondo parolus nur ankoraŭ la anglan aŭ rusan."

Léopold Sedar Senghor,
Prezidanto de Senegalo

Noto de la redakcio: La franca lingvo estas la oficiala en Senegalo, sed ekzistas multe da tribaj lingvoj, el kiuj Wolof kaj Toucouleur estas plejvaste parolataj.

NEKROLOGOJ

JEAN ASQUERI

Jean Asqueri, delegito de UEA por Romans (Francujo) ekde 1945, forpasis en la 14a de januaro. Estante la prezidanto de la loka klubo, li aktivis en korespondado, vojaĝado kaj instruado de Esperanto. Pasintjare, la Kultura Ministerio de Francujo rekonis lian altvaloran kulturan agadon per Esperanto-instruado, nomante lin "kavaliro de la akademiaj palmoj".

MAURICE LEWIN (1884-1971)

Forpasis en la 12-a de marto 1971 Maurice Lewin, aŭtoro de *Meteorologia terminaro* (1961) kaj fondinto de Veterana Esperantista Klubo, unu el la fakaj organizaĵoj kunlaborantaj kun UEA. Li funkciis ankaŭ kiel fakdelegito de UEA por Dunstable en Britujo ekde 1954.

THERESA YELLAND (1882-1971)

Ne longe post la morto de Ernest Edward Yelland antaŭ du jaroj, lia edzino Theresa forpasis en Aspremont, Francujo. Konata kiel la donacintoj de grandaj sumoj al UEA, la paro dediĉis sian tutan vivon al la Esperanto-movado. (Vd.: *Esperanto*, n-ro 756, p. 171; n-ro 760, p. 43). Interalie Theresa Yelland redaktis dum 3 jaroj la gazeton *Liberpensulo*.

Antaŭ la ĉerko kovrita per la Esperanta flago, la 3an de marto, parolis en la nomo de UEA s-ro R. Fiquet, fakdelegito en Nice.

EŬGENO A. BOKAREV

Nekrologo sekvos en la venonta numero.



UNUA KOMUNIKO PRI PORTLAND

57-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Portland (Oregon), 29.7. - 5.8.1972

Alta Protektanto: Governor Tom McCall, Estro de la ŝtato Oregon, Usono.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Aliĝiloj kaj glumarkoj

Novaj aliĝiloj por la kongreso estas senpage riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la kongreso. Estas riceveblaj ankaŭ 3-koloraj glumarkoj ĉe la libroservoj je prezo de po 0,50 gld por dek-marka folio.

Internacia Karavano

Jam pli ol 50 personoj el 10 landoj aliĝis al la aviadila karavano de UEA al Portland. Tiuj, kiuj ankoraŭ deziras profiti de la reduktita prezo de la flugo, anoncu sin al f-ino M.H. Vermaas, komisiito por specialaj taskoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam 3002, Nederlando.

Kongresa emblemo

Silueto de Usono kun markita punkto de la urbo Portland en la ŝtato Oregon, kvinpinta stelo kaj la teksto "57-a Universala Kongreso de Esperanto, 29 julio - 5 aŭgusto 1972, Portland, Oregon" formas la desegnon de la oficiala kongresa emblemo. (Oni ne konfuzu la situon de Portland en ŝtato Oregon kun tiu de Portland en ŝtato Maine. Ili distancas unu de la alia je pli ol 5000 kilometroj!)

Informoj pri la kongresurbo

Faldfolioj pri la urbo Portland kaj la hotelo Hilton (la kongresejo) kun interesaj kaj utilaj informoj pri la prezoj, manĝaĵoj kaj loĝeblecoj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la kongreso. Ĝenerale oni povas konstati, ke la prezoj en Portland estas multe malpli altaj, ol en Novjorko, kaj fakte eĉ pli malaltaj ol en aliaj mondaj urbegoj.

Loĝeblecoj

Laŭ favora aranĝo kun la estroj de Hilton-hotelo en Portland, la hotelo servos kiel senpaga kongresejo kondiĉe, ke almenaŭ ducent kongresanoj mendos litojn en tiu hotelo. Apudaj eblecoj estas la litoj en Universitato de Portland kaj en *Viking Hall* de Portlanda Ŝtata Universitato. La detalaĵojn anoncos la Oficiala Bulteno.

Postkongreso en San Francisco

La oficiala postkongreso de la 57-a UK okazos de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 1972 en San Francisco sub

la patroneco de la urbestro. Kolora reklamfolio kaj detalaj informoj estas riceveblaj ĉe Esperanto-Informcentro, 410 Darrel Road, Hillsborough, California 94010, Usono.

Nova kongres-rabato por ŝip-pasaĝeroj

Atlantic Passenger Steamship Conference (APSC) – unuiĝo de 25 gravaj ŝipkompanioj el 13 landoj – antaŭnelonge decidis agnoski 50%-an rabaton al edzino vojaĝanta kune kun la edzo por partopreni en internacia nekomerco-cela kongreso. La rabato, kiu certe interesos la partoprenantojn de la UK en Portland, validas ankaŭ en kazo de vojaĝo ire per ŝipo kaj revene per aviadilo kaj ĝi estas aplikebla ankaŭ por mondvojaĝoj.


Simbolaj aliĝoj

Esperantistoj, kiuj ne mem partoprenos la Universalan Kongreson en Portland, havas la eblecon manifesti sian moralan kaj financon subtenon al la Kongreso per simbola aliĝo. La nomoj de simbolaj aliĝintoj estos enskribitaj en la Kongresa Libro de la 57-a UK, kaj ankaŭ ili ricevos ĉiujn presaĵojn de la UK. La minimuma kontribuo por la simbola aliĝo estas 30 gld.

Statistiko (je la 15-a de marto 1971)

Alĝerio 2, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 1, Britujo 3, Ĉeĥoslovakio 1, Danlando 1, Finnlando 5, Francujo 16, F.R. Germanujo 6, Italujo 3, Japanujo 2, Kanado 6, Madagaskaro 1, Meksiko 1, Nederlando 12, Nov-Zelando 1, Pollando 1, Svedujo 7, Svisujo 2, Unuiĝinta Araba Respubliko 2, Usono 23.

Entute 98 aliĝintoj el 21 landoj de 5 kontinentoj.



La butikuma centro Lloyd en Portland, Oregon, ĉ. 3 km. for de la centro de la urbo. En ĝiaj 100 vendejoj laboras 5000 personoj. La parkejoj povas enteni 3000 aŭtojn.



56-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Londono, 31.7. - 7.8.1971

Alta Protektanto: Lordurbestro de Londono Sir Peter Studd.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Filatel ekspozicio ĉe la UK!?

La Loka Kongresa Komitato volonte akceptos proponojn de individuoj aŭ grupoj filatelistaj por elmontri interesajn (laŭtemajn) kolektojn de poŝtmarkoj kaj eventuale poŝtstampoj. Preferataj estos jam pretaj aranĝoj kun rilato al Esperanto, lingva problemoj aŭ la kongreslando.

Ankaŭ "Traveller" flugos al Londono

Al 7 jam anoncitaj naciaj karavanoj al Londono ĵus aliĝis la oka. La flugvojaĝon por svislandaj esperantistoj preparas vojaĝoficejo Traveller, Fraumünsterstr. 4, CH-8022 Zürich, Svislando.

Atentu la limdaton: la 20-an de majo 1971

Por profiti de la kongresa loĝiga servo estas absolute necese, ke la mendoj atingu la konstantan adreson de la kongreso plej malfrue la 20-an de majo 1971. Post tiu dato la LKK ne plu povos pritrakti la loĝigadon.

Aplaŭdoj por la sonbendo

Vere sukcesa fariĝis la reklama kaj propaganda sonbendo pri Londono preparita de LKK-ano Peter Schilperoord (1, Heron House, Church Grove, Hampton Wick, Kingston upon Thames, Surrey, Britujo). Dum mallonga tempo alvenis multaj mendoj el Svedujo, Francujo, Pollando, Finnlando, Ĉeĥoslovakio, F.R. Germanujo, Norvegujo, Nederlando k.a. Novaj mendoj por la sonbendo, same kiel por la kongresa afiŝo (ruĝkolora londona aŭtobuso) estas bonvenaj ĉe la supra adreso.


Fakaj organizaĵoj aktivas

Preskaŭ 30 fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj kunvenos enkadre de la 56-a UK. Inter ili ankaŭ diversaj filozofiaj kaj religiaj societoj, ekzemple bibliistoj, islamanoj, katolikoj, kvakeroj, oomotanoj, protestantoj, spiritistoj. Krome okazos tiel nomataj interreligia kaj ekumena kunvenoj.

Statistiko (31.3.1971)

Alĝerio 2, Argentino 5, Aŭstralio 6, Aŭstrujo 15, Belgujo 36, Brazilo 1, Britujo 325, Bulgarujo 78, Ĉeĥoslovakio 5, Danlando 24, Finnlando 62, Francujo 214, F.R. Germanujo 107, Grekujo 3, Hispanujo 44, Hungarujo 13, Irlando 2, Islando 3, Israelo 7, Italujo 67, Japanujo 30, Jugoslavio 23, Kanado 10, Koreujo 4, Nederlando 108, Norvegujo 34, Nov-Zelando 4, Pollando 14, Portugalujo 4, Rumanujo 3, Sovetunio 2, Svedujo 81, Svisujo 19, UAR 2, Usono 34. Entute 1391 personoj el 35 landoj — rekordo de post 1966.

Libro aperinta okaze de la 56-a UK en Londono jam atendas la kongresanojn kun utilaj informoj.



radio

Ĉu vi timas aŭskulti Esperanton ?



En universalaj kongresoj kaj aliloke, kie oni havas okazon interparoli kun multaj esperantistoj kaj fari enketon pri ilia atento al la radioprogramoj en Esperanto, la ĝisnunaj spertoj ne estas tre esperigaj. La ĝeneralaj respondoj, se oni forkalkulas personojn, kiuj tre regule aŭskultas diversajn programojn, plejparte varias laŭjane: "Mi ne havas tempon — tute ne interese por mi — mi loĝas malfavore por la radioondoj (grandurbe) — mi provis sed neniam sukcesis — tian bruegon oni ne povas aŭskulti por hazarde trovi unu vorton en Esperanto ĉiun trian minuton — mia ricevilo ne taŭgas por Esperanto-programoj...ktp."

Unu specifa respondo venas de tiuj, kiuj malŝatas aŭskulti alian radioprogramon, ol tiun de la propra lando/regiono. La kontraŭstaro evidente baziĝas sur la fakto, ke tiuj homoj ege timas aŭskulti disaŭdigojn el aliaj medioj politikaj, kulturaj kaj sociaj, ol siaj propraj. Tio sekve rilatas ankaŭ programojn en Esperanto. Kial? Supozeble pro timo, ke tiuj "aliaj" povus influi kaj skui la trankvilan internon de la aŭskultanto. Verŝajne oni tiel volas eviti endoktriniĝon kaj nepre konservi siajn "establitajn" opiniojn. La defenda konkludo, kiun ofte aŭdas intervjuanto, estas jena: "Ne, mi ne povas, nek volas aŭskulti tendencajn dissendojn de tie...."

Nu, la realeco nepre devas havi alian aspekton. La prijuĝo pri "kolorigitaj" programoj cetere tre ofte estas la sama, se oni demandas al du personoj el du malsimilaj sociaj sistemoj. Reciproke ili parolas pri tendencaj programoj. Kaj ambaŭ evidente pravas, ĉiu el sia vidpunkto!

Ni esperantistoj, kiuj konstante provas plifirmigi nian interpopolan, jes supernacian, rigardon al la mondo, ĝuas la avantaĝon senpere rilati kun homoj el ĉiuj eblaj sistemoj, aŭskulti ilin kaj informi ilin respektive. Ni ne nur diru, sed ni efektive montru, ke ni nun estas maturaj por mondcivitaneco en la vera senco de la vorto, ĉu ne? Ni ne nur parolu pri monda kulturo en niaj vicoj, ni ankaŭ aktive laboru por ĝi kaj — ĉiu unuope — mem akiru ĝin iom post iom!

Se esperantisto havas eblecon aŭskulti programojn el deko da diversaj landoj ĉiusemajne, li estu feliĉa pro tio kaj komprenu la signifon de tiu praktika uzo de Esperanto. Pensu, kian favoron vi havas perfektigi en flua uzo de *via* internacia lingvo. Ni estu ĝojaj kaj kontentaj, eĉ se nia "hejma" stacio ankoraŭ ne sendas en Esperanto. Ankaŭ ĝi baldaŭ povus komenci, se la esperantistaro meritis tion....

Intertempe ĉiu aktiva esperantisto ekzercu la kribradon de ĉiuspecaj informoj, riceveblaj per Esperanto tra la radio, ĉu ne?

"Inter"

RADIO WIEN nun dissendas sian programon ĉiun kvaran merkredon; la datoj de la venontaj elsendoj estas 12-V, 9-VI, 7-VII. La uzado de mezlongaj ondoj dum la posttagmezo bedaŭrinde ne ebligas aŭskultadon longdistance. Estus grave, ke eventualaj aŭskultantoj skribu multnombro al la stacio por peti uzadon de mallongaj ondoj, pli oftajn programojn kaj dissendojn je pli taŭga horo, preferinde vespera. Skribu al Aŭstra Radio, Esperanto-elsendo, Argentinierstr. 30a, A-1041 Wien, Aŭstrujo. Sufiĉa nombro da leteroj el eksterlando instigos la staciestraron disvastigi tiun programon.

RADIO SOFIA. La prizorgantoj de la Esperanto-disaŭdigoj de ĉi tiu stacio penas plibonigi kaj variigi la dissendojn. Ĉiu povas helpi ilin, se post aŭskultado li tuj sendos leteron, en kiu li sincere esprimas sian opinion pri la disaŭdigo. Krome oni povas peti disaŭdigadon de kanzonoj esperantigitaj kaj aperintaj sur diskoj; oni povas mencii la nomon de iu el la ĝekantistoj: s-inoj Mimi Nikolova, Margret Nikolova, s-roj Miŝo Zdravev kaj K. Semov. Oni povas ankaŭ peti elektitajn programojn de la 10-a Bulgara Festivalo de la Junaj Geesperantistoj, kiu okazis la 3-an kaj 4-an de la pasinta aprilo en urbo Jambol.

RADIO TALLINN jam ricevis leterojn el 14 landoj pri la Esperanto-programo; pro tio la estraro de la stacio decidis daŭrigi la elsendojn ĝis nun eksperimentajn. Tio estu instigo al ĉiuj pli ofte skribi al la diversaj radiostacioj, kiuj dediĉas parton de sia programo al Esperanto, kaj speciale al Eesti Raadio, Esperanto, p.k. 402, Tallinn, Sovetunio.

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16^e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la januaran eldonon.

LA MONDA LINGVO-PROBLEMO

Pro ŝanĝo de la presejo kaj redakcia prokrasto malfruiĝis grave la lastaj numeroj de la revuo de CED "La Monda Lingvo-Problemo". La nuna stato estas (meze de aprilo), ke n-ro 6 estas tute preta por preso, dum n-ro 7 (la unua de la jarkolekto 1971) estas plejparte kompostita. Ni esperas rekapti la eldonritmon ĝis la fino de 1971.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 445, 1 aprilo 1971

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de julio neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Bulgarujo: S-ino B. St. Meĉikjan (FD), Plovdiv. **Francujo:** E. Jouis (FD), Boissieu; J.-P. Colnot (FD), Nancy. **FR Germanujo:** F. Lautenbach (FD), Fulda. **Hispanujo:** J. López Plazas (D, FD), Cullera. **Italujo:** E. Mingo (FD), Napoli; C. Lovera (FD), Torino; G. Martini (D), Pisa; d-ro S. Boschini (D, FD), Treviso; S.-F. Tarlindano (D, FD), Venezia; L. Costantini (FD), Verbania Intra. **Meksiko:** f-ino E.M. Magaña de Baca (D, FD), Chihuahua. **Nederlando:** f-ino P. Oosthoek (FD), Arnhem; W. Böttcher (VD), Leeuwarden; f-ino B. Koopmans (JD), Leiden. **Polandio:** R. Jałowicki (FD), Kielce; S. Śmigielski (D), Koźle; M. Kostecki (FD), Kraków. **Sovetunio:** D. Kolker (FD), Zaporozje. **Usono:** d-ro H. Weiner (D, FD), Aberdeen; A. Fantini (D), Brattleboro; L. Cook Jr. (D, FD), Circleville.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1971)

Britujo: Dunstable (D, FD). **Francujo:** Aspremont (D); Bayeux (D); Toulouse (FD instruado); Lyon (FD komerco). **FR Germanujo:** Baden-Baden (D, FD); Krefeld (FD transporto); Solingen (FD industrio, turismo); Straubing (D); Gimmeldingen (D, FD PTT). **Hispanujo:** Madrid (VD, FD turismo). **Novzelandio:** Silverstream (FD aŭtomobiloj). **Sovetunio:** Moskva (FD lingvoscienco). **Svedujo:** Alingsås (FD kristanismo). **Usono:** Chicago (FD komerco).

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Oliván Hernando, s-ro S.; Vigo, Hispanujo

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1971

173 Boffejon, s-ro H.; 174 Degryse, s-ro A.; Belgujo. 175 Atkinson, s-ro G.B.; 176 Atkinson, s-ro W.G.; 177 Bellatti, s-ro S.E.; 178 Cross, s-ino D.; 179 Knight, s-ino E.B.; 180 Pilling, s-ino F.K.; 181 Withy, s-ro D.H.; Britujo. 182 Schröder, s-ro O.; Dan-

lando. 183 Maczkowski, s-ro A.; 184 Planchenault, s-ro L.-M.; Francujo. 185 Hoffmann, s-ro U.; FR Germanujo. 186 Castelltort Riba, d-ro J.; Hispanujo. 187 Daams, f-ino N.L.; 188 Perdeck, s-ro J.W.; Nederlandio. 189 Moore, s-ro V.R.; 190 Wiltshire, s-ro A.G.; Novzelandio. 191 Almén, s-ro P.; 192 Blid, s-ro A.; 193 Gävle Esperantoförening; 194 Lidell, s-ro V.; 195 Mellberg, f-ino G.; 196 Persson, s-ro O.; 197 Sandelin, s-ro B.; Svedujo. 198 Calvert, s-ro E.; 199 Chobanoff, d-ro S.; 200 Kailenta, s-ro J.; 201 Parkerson, s-ro J.; 202 Thomas, s-ro F.; Usono.

DONACIOJ (gld.)

Fondaĵo Canuto: Britujo: N. Rytjkov, 45,—. Sumo ĉijara ĝisnuna 238,28.

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: F.R. Germanujo: A. Hirsch, 20,—; G. Sack, 4,—. Sumo ĉijara ĝisnuna 120,89.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: (por la presejo) Usono: R. Stahl, 4,95. Sumo ĉijara ĝisnuna 169,49 krom por la presejo 4,95.

Ĝenerala Kaso: Belgujo: f-ino Stella De Weerd, 20,—. Honkongo: W.J. McLintock, 7,—. Svedujo: P. Almén, 78,30. Usono: d-ro Valentinuzzi, 20,52. Sumo ĉijara ĝisnuna 1 513,—.

Kampanjo "100 x 100": (Por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum tri jaroj ekde 1971 po 100 gld. aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj.)

24 Ragnar Hjort, Svedujo

25 Isiguro Ter, Japanujo

26 Anonima

27 s-ino A.M.E. van Walsem - Schutte, Nederlandio

28 Petro Nuez, Hispanujo

29 Ramón Molera, Hispanujo

Patrono A de TEJO: 32 R.H.M. Markarian, Britujo. 33 prof-ino V. Skaljer-Race, Jugoslavio.

Por TEJO: Usono: A.L. Ziegenhagen, 8,—. Sumo ĉijara ĝisnuna 10,92.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

Anoncetoj

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

Mi deziras interŝanĝi malgrandajn (10 x 15 cm.) flagojn de Usono aŭ ĝiaj ŝtatoj por flagoj de landoj, provincoj, urboj ktp. Skribu unue vian elekton kaj tiun, kiun vi proponas sendi. Sheard, 1240 Ontario, Cleveland, Ohio 44113, Usono.

Salutu per aerpoŝta karto la 13-an Kanadan Kongreson de Esperanto okazontan en julio 1971. Respon- don ricevos ĉiu sendinto. LKK, s-ro T. Mercier, prez., 1495 Kingston, Sherbrooke, Québec, Kanado.

Kiu ludonus aŭ vendus esperantlingvajn filmojn, Super-8? Willimann, 53 av. d'Aïre, CH-1203 Genève.

16 gelernantoj (14-jaraĝaj) komencis Esperanto-kur- son la 1-an de marto. Ŝatus korespondi individue aŭ klase. Esperanto-klaso, Sager School, College Place, Wa. 99324, Usono.

Esperanto-muzeon en Rumanujo en Covasna oni ko- mencis fondi. Tiuj, kiuj havas superfluaĵojn esperanta- ĵojn, bonvolu sendi ilin al: s-ro Jenő Zágoni, str. Gá- bor Áron 30, Covasna, Rumanujo.

ANONCETOJ

(daŭrigo de p. 99)

Poŝt-striko Britujo 1971: La privata poŝtservo Post-Haste uzis markojn kun teksto en L.I. Serio neuzita aŭ uzita sur koverto 4,20 GM + 0,50 GM (afranko). Diversaj E-poŝtmarkoj kaj poŝtstampoj liverablaj. Neussner, D-1 Berlin 62, Dominicusstr. 40.

Noveldonita turista prospekto en Esperanto okaze de la urba jubileo 1971. Petu senpage de: Turista Oficejo, Parkgatan 2, S-411 38 Gotenburgo, Svedio.

Kursaninoj 12-15-jaraj deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Skribu al la kursgvidanto: Daniel Luez, Rue Faglain, 02-LAON, Francujo.

Antaŭkongresa ferio en Danlando. Ekkonu danan filozofion kaj danan ferian vivon. Pasigu la antaŭkongresan semajnon (24.7.-31.7.71) en la feria centro KOSMOS en Danlando. Prelegoj kaj liberaj diskutoj pri esencaj demandoj de la vivo, i.a. pri Esperanto-problemoj. Feriado en bela naturo apud la maro. Ekskursoj al vidindaĵoj kaj historiaj lokoj. Vizitoj en danaj feriaj hejmoj, kie floras intereso pri humanismaj kaj internaciaj demandoj. Petu senpagan broŝuron ĉe Martinus-Instituto, Esperanto-Sekcio, Mariendalsvej 94-96, DK 2000 Kopenhago F., Danlando.

Senpage ni sendas bultenon "Spegulo de imperiismo kaj de reviziismo", kiu informas pri spertoj de internaciismo kaj revolucio. Skribu al: Esperanto, Montenero 22, I-20135 Milano.

Por kolektado, mi serĉas afiŝojn el ĉiuj landoj, ĉiuj epokoj kaj ĉiuj temoj. Kompenso laŭ interkonsento. Skribu al d-ro Berlot, 18, pl. Colbert, F-76-Mont-Saint-Aignan, Francujo.

Turismo: Mi povas helpi, gvidi grupojn; luigi aŭtobusojn; aranĝi interesajn vojaĝojn turistcele: moderaj prezoj. Mi travojaĝos dum julio Nederlandon, Danujon. Esperantaj grupoj povos pretigi kunvenvesperon; mi portos muzikon kaj parolojn por amuzigi ĉiujn. Skribu: Anĝelo Lovati, Via Lipari 8, I-20144 Milano, Italujo.


5 komencantoj — estontaj geinstruistoj 17-20-jaraj — deziras korespondi kun gejunuloj el tuta mondo. Afranku filatele. Foyer culturel E.N.G., rue de Varsovie, F-16-Angoulême, Francujo.

Radio Svedio baldaŭ havos tri novajn, fortegajn sendilojn por la mondaj programoj. Aktualigās disaŭdiĝoj en Esperanto. Proponu, skribu, reskribu al Radio Svedio, Progr. por la mondo, S-105 10 Stokholmo, Svedio. Ref.: INTER-grupo, Gotenburgo.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12 Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Praktikan kovrilon por via jarlibro de UEA vi povas mendi ĉe INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio. Pĉk. 42 66 60 -7. Prezo: Skr 2,60 (4 rpk., 0,50 us. dol., 1,80 gld.).

**Pri budhis-
mo, teozo-
fio, ateismo
kaj popolle-
gendoj dezi-
ras korespon-
di d-ro T.T.
Anuruddha,
poste res-
tante, P.O.,
Vung Tau,
Suda Vjet-
namujo.**



Tri studentoj deziras korespondi. S-ro J. Geron, Amersfoortseweg 18, Huis-ter-Heide, Nederlando.

Nova numero de Bulteno kun poŝtkartoj por via korespondado kun Esperanto-lingvaj radiostacioj kaj aliaj estas mendebla. Prezo inkl. 20 pk: Skr 5,20 (8 rpk, 1,— us. dol., 3,60 gld.). INTER — Societo por la Internacia Lingvo Esperanto en Radio, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio. Pĉk. 42 66 60-7.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton, kio multe helpas al UEA finance. Antaŭdankon!

Bonvenon al internacia Esperanto-rondo 24-29 julio en Gotenburgo. Jubilea programo. Ŝipveturo al Londona kongreso 30 julio matene. Favorajn prezojn! Petu informojn tuj! INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio. Telefono: (031) 48 95 97.

Labori kun esperantistoj en maŝinfabriko, Hanovro. Samideanoj skribu al: s-ro Jean Rawyler, D-3012 Langenhagen, Ringstrasse 7, F.R. Germanujo.

Ferioj en Insulo Madeira. En loko la plej ŝatata, apud la maro, esperantistino luigas du ĉambrojn, banejojn, matenmanĝon. Skribu al Elisa Caetano, Estrada Monumental 244-7° Dto, Caixa 14, Funchal, Madeira, Portugalujo.

UNIVOX-kurso en Esperanto kaj 22 aliaj lingvoj nun vendiĝas en ĉiu kontinento. Petu informojn de INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio.

Universala Revuo kun adresaro "Esperanto Parolata": abonu aŭ petu specimenon (adreso en Jarlibro). Nova prezo 6,50 gld.

Internacia renkontiĝo (1-15 julio 1971) por kampaĉistoj, apud Mediteraneo. Informas Lentaigne, 3 av. Gaillarde, 34-Montpellier, Francujo, kontraŭ respondkupono.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA (2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario, Kanado) povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi kontraŭ 1 respondkupono, kompletan liston de siaj programoj.

POR NUR 50 STELOJ

200 GRANDFORMATAJ PAĜOJ

venis al la abonintoj de SCIENCA REVUO en la jaro 1970 (ne kalkulinte la kovrilpaĝojn kaj la aldonatan BULTENON de ISAE!). La enhavo ankaŭ estis interesa, diversscienca, tre ofte popularscienca.

Ekde la vol. 21 (la jaro 1970) Internacia Scienca Asocio Esperantista pligrandigis la formaton de SCIENCA REVUO (nun B-5, t.e. 17 x 24 cm), plioftigis kaj pliampleksigis ĝian eldonadon (6 numeroj jare, po 32 paĝoj *minimume*).

Apartaj rabatoj por plurjara aŭ dumviva abono. Petu specimenon ĉe la landa delegito (la listo sur la lasta kovrilpaĝo de S.R.) aŭ de la sekretario de ISAE (ĉe prof. B. Popović, Ognjena Price 80, 11000 Beograd, Jugoslavio).

AĈETU LA MEMORLIBRON PRI LA ZAMENHOF-JARO!

Monumento al la aŭtoro de la Internacia Lingvo.
Belega verkaĵo. Prezo: 12,50 gld. + sendokostoj 10%.
Mendu ĝin ĉe UEA!

Eŭropa Feriosemajno en Svislando

(De la 5-a ĝis la 11-a de septembro 1971)

sur Fürigen

ĉe la Kvarkantona Lago (Vierwaldstättersee)

Ĉiutage gvidataj ekskursoj, antaŭtagmezaj Esperanto-kursoj diversgradaj, aranĝoj vesperaj ktp. Moderaj prezoj.

Senpagajn prospektojn vi ricevas ĉe la organiza adreso: Ernst Glättli, Laurstrasse 17, CH-5200 BRUGG (Svisl.).

PS. Jam pli ol 600 pers. ĝuis la diversajn aranĝojn feriajn en Svislando!

Ĉu vi jam legis?

IMPERATIVOJ DE LA VIVO de H. Rohden

Moderna filozofo en la moderna mondo. Li montras la vojon al paco kaj feliĉo.

Ĉe Libroservo de UEA – 2,70 gld.

ATENTU!

ANTAŬ AŬ POST LA LONDONA KONGRESO

VIZITU KEIGHLEY-n,

*la naskiĝlokon de la
brita Esperanta movado kaj
mond-faman Brontë-an Distrikton.*

LA KEIGHLEY-a ESPERANTA SOCIETO
BONVENIGOS VIN !

Por broŝuro skribu al:

Town Clerk,
Town Hall,
Keighley,
Yorkshire,
Britujo.

BONVENON AL GOTENBURGO 1971!

Okaze de la jubilea jaro de Gotenburgo ni kore invitas vin al sestaga restado en internacia, amika Esperanto-rondo, 24-29 julio. Interesa, varia, altkvalita programo. Moderaj kostoj. Ĝustatempa ŝipveturo al UEA-kongreso en Londono favorpreze aranĝota por niaj gastoj kaj aliaj esperantistoj. Petu senpagan prospekton: INTER – Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S 400 53 Gotenburgo, Svedio.

Petu ankaŭ novan turistan prospekton en Esperanto, skribante rekte al: Turista Officejo, Parkgatan 2, S-411 38 Gotenburgo, Svedio.

PARAPSIKOLOGIISTOJ

esperantistoj, kiuj ŝatas kolektiĝi ideoj,
estas petataj tuj skribi al s-ro

Prof-o Corrado Cerri-Calzoni
Casella postale 159
I-13051 Biella, Italujo

TIPA MEMBRO DE UEA LOĜAS EN FRANCUJO

estas viro, aliĝis al UEA antaŭ 15 jaroj aŭ pli longe, kaj pagas kotizon de Membro-Abonanto.

Vi ne bezonas esti tipa! Vi ne povas facile ŝanĝi vian naciecon, vian sekson aŭ la jaron de via aliĝo, sed vi ja povas ŝanĝi la kategorion de membreco.

Libervole paginte 50% pli, ol MA (do 45,— anstataŭ 30,— gld.), vi fariĝos Membro-Subtenanto kaj grave helpos al la fortikigo de la Asocio.

La nomoj de ĉiuj novaj Membroj-Subtenantoj aperas ĉiumonate en la revuo (rubriko "Oficiala Informilo").



Ĉu vi ankoraŭ ne studis la someran programon por 1971

de la ESPERANTISTA KULTURDOMO.
(Fondinto: H. Micard)

Kastelo "Grésillon", F-49-Baugé, Francujo ?

El ĝi, vi povas elekti inter kvar diversaj periodoj same agrablaj por grupoj, familioj, izoluloj.

4/7 – 25/7: Laŭvole, kursoj diversgradaj, ekzamenoj, bindado, korbofarado, emajlado, ekskursoj.

25/7 – 7/8: KULTURAJ kaj TURISMAJ INTERNACIAJ FERIOJ

KULTURAJ: Kun altvaloraj prelegoj

"Sur la spuroj de l' Homo Prahistoria"

"Maroko, pli araba ol la Oriento"

"Kvar monatoj sur la Kanariaj insuloj" de s-ro Rollinger.

"De hieraŭ al hodiaŭ en franca Val' de Loire, diversaj temoj pritraktitaj" de s-ro P. Metivier kaj s-ino Cheverry.

TURISMAJ: Dank' al ekskursoj tra bela intere-soplena regiono.

RIPOZEMAJ en vera Esperantujo

7/8 – 14/8: Postkongreso de S.A.T.

15/8 – 4/9: Sama, kiel por la 1-a periodo.

De pasko ĝis julio kaj dum septembro estas eble akcepti grupojn por pli-malpli longaj periodoj.

Petu informojn, kontraŭ respondkupono, ĉe ĉi-supra adreso. Rezervu ĉambrojn sufiĉe frue.

Agrablajn feriojn promesas al vi – "Grésillon"



Konata verko de la nuntempa franca filozofo Jean-Paul Sartre. Ĉiu moderna pensulo foje legu ankaŭ en la Esperanta traduko de Roger Bernard.

Nun rabatite 7,50 gld. (por nederlandanoj 7,80 gld.) plus sendokostoj 10%

Serio
Oriento-Okcidento
N-ro 3

**LA
NAŬZO**